

BULGARA ESPERANTISTO



4-1980

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Росси́н.

Государ-
ственный

Комитета
депутатовъ.

ирѣ,
осажденъ Бор-
тъ Рабочихъ.

го Комитета
депутатовъ.

мль





Unuamajan saluton al la laboruloj el la tuta mondo, batalantaj por paco kaj homa feliĉo!



Elementa kurso de E-o en u. Svoge. Kursgvidantino Elena Radenkova.

ENHAVO

• • • Lenin, la paco kaj la internaciismo .	1
Georgi Dimitrov. Mia unua renkontiĝo kun Lenin	2
Ljuba Vinarova. Kiam la horloĝoj sonoras .	3
Stefan Poptonev. Ĉiam nova, ĉiam en movado.	3
Todor Jivkov. Salutletero lige kun celebrego de Tr. Ĥristovski	5
Dimitro Haĝiev. Riĉa, inspira kaj fruktodona vivo	6
Dimitro Nedjalkov. Celebro de Kunĉo Vălev	7
Dimitro Mutușev. La Bulgara Esperantista Kooperativo	8
A. B. Celebro de Rajna Konstantinova . .	8
• • • La antaŭkongresa konkurado en marŝo	9
Ĥr. Dimitrov, E. Georgiev. Sukcesa regiona E-konferenco.	10
• • • Tri elstaraj sportistoj pri Esperanto	11
Petro Polišĉuk. Mia poezia kredo	12
• • • De lando al lando	12
Canko Murgin. La nesufiĉe kona'a Zamenhof	13
Ĥristo Dolĉinkov. Esperanto — en la ŝtatajn arkivojn!	15
Ewald Rüb. La instruanto	16
Pecigoj. Sudafrika varianto de „Otelo“ . .	16
• • • Festo de la pupo — festo de la knabino	16
Vesa Paspaleeva. Patrino amo. Festo tutpopola.	III
Marin Bŭcev. Vortenigmo	III
• • • Ni petegas vin, kara turistoj!	IV
• • • Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Vladimir Iljiĉ Lenin — 110a datreveno de la naskiĝo

Redakta komitato:

Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919. Eldonkvanto 6100.



LENIN, LA PACO KAJ LA INTERNACIISMO

Jam pasis cent dek jaroj depost la naskiĝo de V. I. Lenin. Li estas la genia daŭriganto de la revolucia teorio de Marks kaj Engels, senmorta gvidanto de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio en carisma Ruslando, kreinto de la unua en la mondo socialisma ŝtato. Li simbolas la kredon de la laboruloj tra la planedo pri la ebleco konstrui mondon sen ekspluatado, sen armiloj, sen militoj.

Lenin pruvis, ke en la rilatoj de la juna sovetia respubliko kun la ĉirkaŭantaj ĝin kapitalismaj landoj la sola prudenta kaj objektive necesa principo estas tiu de paca konekzistado kaj kunlaborado. Li konsideris la pacan konekzistadon ne kiel provizoran taktikan manovron por gajni provizorajn profitojn. Lia reala ekstera politiko respondis al la baza celo de la sovetia respubliko — paco kaj amikeco inter la popoloj.

Nuntempa Sovetunio konsekvence kaj senŝancelle realigas samdirektan eksteran politikon de serenigo en la internaciaj rilatoj. Tiu politiko estas subtenata de la socialisma ŝtataro de Varsovia Pakto, de vico da nesocialismaj landoj kaj de sobre pensantaj ŝtatestoj en la evoluantaj kapitalismaj landoj. Kaj tio estas memkomprenebla: ja de simila politiko gajnas ne iu sola lando, sed ĉiuj popoloj senescepte. Ni rememoru nur la vortojn de la pafmortigita usona prezidento Ĝon Kenedi: „Hodiaŭ ĉiu socia aganto sur nia planedo devas ofte pensi, ke povas veni tago, kiam nia planedo estigos senhoma. . . Oni devas neniiĝi la militrimedojn antaŭ ol ili estus sukcesintaj neniiĝi nin. Tiu ĉi celo ne plu prezentas nur iun revon, sed problemon de vivo aŭ morto.“ Similajn deklarojn faris ankaŭ tri sekvaj prezidentoj de Usono: Nikson, Ford kaj Karter. Sed al ili ne sufiĉis la kuraĝo sekvi konsekvence la vojon de Kenedi favore al la propraj interesoj de la usona popolo mem. La „akcipitroj“ (malamikoj de la serenigo) sukcesis devojigi la usonan registaron de tiu unusole profita kaj racia politiko, konkretigita en la dokumentoj de SALT — 2, subskribita de Kar-

ter kaj Breĵnev en Vieno. Usono urĝe revivigas la „malvarman militon“.

Lenin multfoje skribis, ke la kapitalo prezentas internacian forton. Tion bonege pruvis la krima agado de la multnaciaj kapitalistaj monopoloj, produktantaj kaj vendantaj amasmortigilojn. La ekzistado de vico da agresaliancoj sur la tuta planedo, kreadaj kaj gvidataj de Usono, ankaŭ pruvas la Internaciecon de la imperiisma kapitalo.

Lenin brile argumentis, ke kontraŭ la internacia forto de la kapitalo la laboruloj devas krei sian propran internacian forton, kapablan kontraŭstari la agreson de la imperiismo. Nuntempe ĝi konsistas el la jenaj ĉefaj taĉmentoj: la socialisma ŝtataro de la Varsovia Pakto, la internacia laborista klaso, la naciliberiga movado kaj la plimulto de la novaj ŝtatoj, kreitaj post la frakaso de la koloniisma sistemo. Apud tiuj realaj pacfortoj tre gravan kaj dignan lokon okupas la monda movado de pacadeptoj frunte kun la Monda Packonsilio. Neniam ĝis nun ekzistis tiel forta, organizita kaj aktiva movado en plej vastaj popoltavoloj kontraŭ la imperiismaj militpreparantoj. Laŭ sia fundamenta ideologio ĝi esprimas la plej intimajn strebojn kaj revojn de la homarplimulto al vivo kaj paco. Ĝi elkreskis kiel plej grava en la mondo nuntempa popolmovado, sukcese influanta la evoluon de la serenigo.

La pacama esperantistaro posedas sian specifan pacbalalan formacion — la Mondpaca Movadon. Kune kun la ceteraj neesperantistaj pacfortoj MEM kontribuas laŭ siaj eblecoj por la venko de la paco. Tiamaniere MEM helpas la kreadon de premisoj por sukcesa evoluigo de la internacilingva problemo, tre intime ligita kun la sorto de la paco.

La bulgara esperantistaro laboras abnegacie por la plua triumfo de la Lenin-ideoj, por realigo de la decidoj de la Deko Nacia Porpaca Kongreso kaj por brila sukceso de la antaŭstaranta en Sofio dum la proksima septembro „Parlamento de la Popoloj por Paco“, organizata de la Monda Packonsilio.

MIA UNUA RENKONTIĜO KUN LENIN

Mia unua renkontiĝo kun Vladimir Iljiĉ okazis en la fino de februaro 1921 en Moskvo, kien mi alveturis laŭ decido de la CK de Bulgara Komunista Partio. Min oni loĝigis en la komunloĝejo de Kominterno (estinta gastejo „Lukso“), kie oni kutime enhoteligis alvenintajn en Moskvon reprezentantojn de komunistaj partioj. Jam la sekvan tagon post mia alveturo la sekretario de Lenin telefonis al mi kaj diris, ke Vladimir Iljiĉ volas hodiaŭ vespere vidi min en sia kabineto en Kremlo. Dum tiu tempo Lenin kutime invitadis al si multajn reprezentantojn de diversaj komunistaj partioj por konatiĝi kun ili persone kaj ricevi senperajn informojn pri iliaj partioj kaj landoj.

Kune kun iu rusa kamarado precize je la fiksita tempo mi estis jam en la akceptejo de Vladimir Iljiĉ, kaptita, kompreneble, de treega ekscitiĝo kaj neesprimebla ĝojo.

Ne pasis 2—3 minutoj, kaj Lenin malfermis la pordon de sia kabineto kaj invitis min eniri. Li gastame salutis min kaj, kiel kutime li scipovis fari, ĉirkaŭrigardis min de la kapo ĝis la kalkanoj per sia akra sagaca rigardo. Kiam mi transdonis al li la varmegajn salutojn de nia partio kaj de la laboruloj de nia lando, Lenin kun sia kutima bona rideto prenis mian manon kaj diris:

— Mi scias, via popolo estas bona, kuraĝa popolo.

Komenciĝis interparolo, kiu daŭris pli ol unu horon. Apenaŭ nun mi kapablas rememorigi al mi la fundamentan parton de tiu konversacio ne laŭ la memoro, kiu, kiel konate, ne ĉiam estas la plej fidinda fonto, sed laŭ miaj tiamaj mallongaj notoj, kiuj lastatempe estis trovitaj en mia persona arkivo, konsiderata senspure perdita.

Vladimir Iljiĉ metis al mi multnombrajn demandojn pri la politika situacio en nia lando, pri la rolo de la monarkio kaj la burĝaj partioj, pri la eksterlanda influo en nia lando, pri la kvanto kaj rolo de alilanda kapitalo, pri la interrilatoj de Bulgario kun la najbaraj balkanaj ŝtatoj, pri la armeo de Vrangeli, troviĝanta sur la bulgara teritorio, kaj aliaj. Aparte grandan intereson li montris pri nia partio, pri la agrarista unuiĝo, pri la rilatoj inter la laborista klaso kaj la kamparanaj amasoj kaj pri la rilato al la Soveta Socialisma Respubliko.

Mi klopodis respondi al ĉiuj demandoj. Pri kelkaj pli malfacilaj mi promesis, ke nia partio sendos la necesajn aldonajn informojn.

Lenin dum la tuta tempo aŭskultis atente kaj iufoje prenis por si notojn. Konklude li diris proksimume la jenon:

— Koncentru vian ĉefan atenton al la fortikigo de la Komunista Partio kiel avangardo de la laborista klaso kaj okupiĝu serioze pri la organizado de la laborista klaso mem, des pli, ke ĝi ankoraŭ estas relative malforta en kvanta kaj kvalita rilatoj (vi ankoraŭ ne havas postularajn laboristojn). Samtempe kreu la unuiĝon de laboristoj kaj kamparanoj (antaŭ ĉio kun la kamparana malriĉularo kaj la mezuloj). Pligrandigu la influon de la komunistaj ideoj en la armeo (ĉefe inter la soldataj amasoj).

Aparte estas grava la preparo de sperta kaj sindona komunista specialistaro. Ĉe ni la preparado de spertaj, sindonaj kaj aŭtoritataj gvidantoj de la partiaj organizaĵoj daŭris dum 15 jaroj (1903—1917). Tutajn 15 jarojn de batalo kontraŭ la menŝevismo, 15 jarojn de kruelaj persekutoj de la carismo, tutajn 15 jarojn inter kiuj ankaŭ la jaroj de la revolucio de 1905. Kaj spite al tio ĉe ni estis malĝojaj okazoj, kiam eĉ tre bonaj kamaradoj „perdis la kapojn“. Se vi, kaj entute la okcidenteŭropaj kamaradoj, imagas, ke ili estas sekuritaj kontraŭ similaj okazoj, tio estas tia nematureco, kontraŭ kiu necesas bataladi senindulge. La preparado de la partiaj gvidantoj kaj specialistaro estas afero tre malfacila. La sukceso en tia afero estas ebla nur rezulte de konstanta laboro, de batalo kaj ĝusta komunista elekto de specialistaro farenda de niaj partioj. Ĉi tio estas nun la plej grava kaj, mi dirus, decida por via komunista partio. Do, sin gardu kontraŭ pasio, agu sobre, senlace preparu vin por garantii la venkon de la revolucio en via lando.

Mi dankis sincere pro ĉi tiuj valoraj, saĝaj konsiloj. Vladimir Iljiĉ akompanis min ĝis la akceptejo, prenis mian manon per du manoj kaj diris por adiaŭo:

— Mi deziras al via partio kaj al vi persone la plej bonajn sukcesojn. Ni ne dubas, ke via partio kaj la bulgara popolo estas fidelaj amikoj de nia Soveta Socialisma Respubliko. Nia lando travivas nun tre grandajn malfacilaĵojn, kaj lige kun tio ni diskutas nun la demandon pri la nutraĵa imposto. Sed ni estas profunde konvinkitaj, ke nia partio kaj la soveta potenco sukcese venkos ĉiujn malfacilaĵojn.

El la rusa: A. Smolin

KIAM LA HORLOĜOJ SONORAS

LJUBA VINAROVA

Terure malsata estas la tero.
Terure malsataj estas la homoj.
En la alarĝo de la vespero
verdaj araneoj kiel demandsignoj
sin treditas en la longajn herbojn
kaj susuras nekaptitaj en la paŝoj.
«Ĉu vi kredas je la Revolucio?» —
demandis Lenin.
«Venu morgaŭ matene je la kvara!» —
diris maljuna mujik'.
La montetoj blankiĝis de la lasta spiro de
l'nokto,
kaj la radikoj dronis en roso.
La junaj birdoj vekigis.
Inter la longaj herboj ektitis
la ruĝaj ringoj de la suno.

Peza sunleviĝo ĉirkaŭbrakis lante la teron.
«Ĉu vi kredas je la Revolucio?» —
demandis Lenin.
La maljuna mujiko montris
al la sangruĝa sunleviĝo
super la pintoj de la pinoj.

«Ĉu vi kredas je la Revolucio?» —
demandis Lenin.
Kaj miloj de kolosaj mujikoj
kun disŝiritaj bastonoj
alportis en siaj malhelaj manoj
aŭronon.

Esperantigis Penka Bato eva



ĈIAM NOVA, ĈIAM EN MOVADO

Stefan Poptonev

kontraŭ la leninismo diversaj oportunistoj, reviziistoj — ultradekstraj kaj ultramaldeksraj. Pafis kaj atakis ĝin frontale la faŝistaj kirasaj divizioj, ĝis ili rompigis ĉe la muroj de Moskvo kaj iliaj faligitaj standardoj estis ĵetitaj antaŭ la maŭzoleon de Lenin, en la koro de la soveta ĉefurbo. En potenca Lenin-impeto levigis de rando al rando la soveta lando, por defendi sin kaj la tutan homaron. Ĝi levigis el la militruinoj por enporti varmon en la malvarman militon, kiun la sinjoroj el trans oceano proklamis, starigante feran kurtenon inter la socialismo kaj si mem.

La printempaj blovoj de la Lenin-politiko kaj praktiko de la Soveta Stato kaj la socialisma komunismo de popoloj kaj landoj fandis la feran kurtenon. Unu post alia rompigadis la ĉeneroj de la imperiismaj ĉenoj. Per sennombraj viktimoj, per sango kaj ŝvito, iufoje per zigzagoj kaj erarvado, sed ĉiam en la klimato kaj ĉeesto de la socialismaj landoj kaj Sovetunio, la popoloj ekstaras kaj ekiras la vojon de memstara ŝtata vivo kaj disvolviĝo. Tion iliaj ĝishieraŭraj sinjoroj ne povas engluti, tial ili nervumas, amasigas armilojn. Kontraŭ kiu kaj por kio estas tiuj armiloj? Por konservi „la statu kvon“, la senŝanĝon, por reteni la disvolviĝon de centoj da milionoj da homoj, kiuj ĝuste pro la imperiismo vivas en analfabeteco kaj malkleron, en malriĉeco kaj mizero, en malsanoj kaj malsato. Tiu senŝanĝo, kiun iam Lenin kaj la Lenin-partio rompis sur unu sesono de la tero, eltenis kiel roko kontraŭ la imperiisma oceano, por krei la plej grandan atingon de nia tempo — la socialisman komunismajn ŝtatojn kaj popolojn. La leninismo — tio estas kreado kaj movado. Vane iuj serĉus ĝin en la frostigitaj

Lenin naskiĝis en la printempo. Kaj li restas por ĉiam printempa noviganto. Rigardu la karton de la mondo. Dum la jardekoj, kiujn ni nomas Lenin-epoko, malaperis imperioj, regantaj marojn kaj oceanojn. Iam Lenin antaŭdiris, ke kiam la koloniigitaj kaj dependaj popoloj levigos kaj disrompos la imperiismajn katenojn, kiam ĉesos la torento de tiuj dolaroj, kiuj odoras je petrolo kaj sur ĉiu el ili estas homa sango, la imperiismo perdos forton kaj poziciojn. Nuntempe, dum la ĉiam pli granda supreniro de la Lenin-epoko, la imperiismo ĉiam senĉese pli multe perdas poziciojn en siaj vanaj penoj haltigi la radon de la historio; ĝi arbitre proklamas por si la rajton havi en la sfero de siaj „vivnecesaj“ interesoj tiajn regionojn de la mondo, kie la popoloj neniam ĝin invitis, nek toleros ĝian sinjoran altrudon.

Lenin devis naskiĝi kune kun la strebado de la iama prizono de la popoloj — Rusio — al printempa renoviĝo, kune kun la strebado de la homaro eliri el la koŝmara cirklo de la imperiismaj militoj kaj eniri finfine en la periodon de reveno al si mem, al sia homa esenco.

Kontraŭ Lenin pafis la eserino* Kaplan per la venenaj kugloj de sia malamo. Pafis

* Eserino — membro de la kielia partio etburga.

ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ

Mi permesas al mi komenci ĉi tiujn liniojn per epizodo, kies rolulo estis ankaŭ mi. Tio okazis en Varso, dum la 63a Universala Kongreso. Foliante la kongresan libron, mi estis impresita de titolo, kiu tekstis: „Internacia lingvo — internacia edukado“. Ĉi tio estis la temo de la ĝenerala kunveno de la kongreso. Ĉar, laŭ mi, ĉi tiu titolo povintus postlasi la ideon de samkategorio de la nocioj „lingvo“ kaj „edukado“, mi petis la parolon en la ĝenerala kunveno kaj provis diferencigi ambaŭ nociojn, emfazante, ke dum la nocio „edukado“ havas ideologian karakteron, la nocio „lingvo“ ne estas ideologia nocio. La lingvo estas rimedo. Kiel ĉiu rimedo ĝi povas esti uzata por bonaj kaj malbonaj celoj. Dependas de la uzanto.

Tuj post mia eldiron ekstaris kongresanino, kiu, evidente, apenaŭ povis reteni sian indignon. Ŝi sentis mian eldiron kiel sakrilegion, kiel malhonorigon de E-o.

Mi ne estis surprizita de ĉi tiu emocia reago. Ĝi estas ofte renkontata en la medio de la e-istoj kaj estas facile komprenebla. Karaktera trajto de la homa naturo estas la emocia mikso inter celo kaj rimedo. Iom post iom la noblajn celojn, al kiuj la e-istoj strebas kaj kiujn ili atingas per E-o, oni komencas identigi kun la lingvo, forgesante, ke la noblaj celoj estas rezulto de la nobla volo de l'uzanto de la lingvo. Eĉ la plej perfekta instrumento per si mem ne povas doni bonajn rezultojn, se ĝi ne estas en bonaj manoj.

Aserti, ke E-o kiel internacia lingvo estas ideologio, tio signifas fari malbonan servon al la propagando pri E-o. Fundamenta argumento de tiu propagando estas, ke E-o kiel komunika rimedo ne distingiĝas disde la etnaj, „naturaj“ lingvoj. Sed ĉu la etnaj lingvoj estas ideologio? Atribui al E-o similan karakteron signifas forigi el la propagando pri ĝi ĝian plej efikan armilon.

La ideologiigo de E-o havas ankaŭ aliajn fontojn. Ĝi estas rezulto de intermiksado inter la nocioj E-o kaj e-isto.

Konate estas, ke en la nuna historia momento sub la nocio e-isto estas komprenata ne nur homo, kiu scias kaj uzas E-on, sed homo, kiu uzas E-on por noblaj celoj. Pli ĝuste dirite, la e-isto estas homo, kiu strebas al la noblaj celoj de internacia interkomprenigo kaj amikeco pere de E-o. Tiu ĉi karakteriza trajto de la e-isto en la hodiaŭa historia momento montras klare, ke la nocio e-isto estas ideologia nocio. Tiu ĉi ideologia karaktero de la nocio e-isto aŭtomate estas transportata al la nocio E-o.

Malkovrante la enhavon de la nocio e-isto kaj difinante ĝin kiel ideologion, oni devas distingi ĝin disde la nocio „scienco“ de E-o. Estas homoj, kiuj scias E-on, sed ne estas e-istoj. La idistoj ekzemple sciis bone E-on, sed ne estis e-istoj. Tre bone konis E-on d-ro Alfandari, la aŭtoro de NEO, sed li ne estis e-isto. Sufiĉe bone konis E-on la sovetia sciencisto Svadost, sed li ankaŭ ne estis e-isto. La scienco de E-o, kiu lernas la lingvon nur por scii ĝin aŭ nur el teoria vidpunkto, ne estas e-isto. La nocio scienco de E-o do ne estas ideologia nocio. Nature, tio ne signifas, ke la scienco de E-o estas homo nedezirata. Ankaŭ lin devas koncerni nia E-propagando. Oni devas varbi sciencistojn de E-o, ĉar ili estas rezervujo de e-istoj.

Kiaj estas la organizitaj en UEA homoj? La organizitaj en UEA homoj estas e-istoj, t. e. homoj, kiuj strebas al noblaj celoj pere de E-o. Do UEA kaj la aligitaj al ĝi organizacioj estas organizacioj de e-istoj. Ili ne estas Esperanto-organizacioj, ĉar ili ne estas organizacioj de sciencistoj de E-o. Pro tio oni ne povas konsenti, ke la nomo Universala Esperanto-Asocio estas korekta nomo. La ĝusta nomo devas esti Universala Esperantista Asocio. La saman malĝustigon entenas ankaŭ la bulgara nomo de la asocio de la bulgaraj e-istoj: Bŭlgarski Esperantski Sŭjuz (Bulgara Esperanto-Asocio). Samtempe tamen la Esperanta nomo de la asocio — Bulgara Esperantista Asocio — fiksita en la statuto de la bulgara organizacio, respondas ĝuste al la esenco de la organizacio.

(Sekvas de 3 paĝo)

dogmoj, inter la pasintjaraj folioj. Lenin la tuta estas en la printempo, en la renovigo, en la novaj burĝonintaj ŝosoj kaj ĝerموj de la komunisma moraleco, en la batalo por aliformigo kaj harmoniigo de la homo. En la centro de la Lenin-praktiko kaj Lenin-instruo estas la homo. Luj senrajtigantoj ploru pri la rajtoj de la homo. La homo de la socialismo pruvis, ke li povas aliformi la mondon kaj sin mem, ke li povas krei tian socion, en kiu ne plu estos abismo inter riĉeco kaj malriĉeco, inter sataj kaj malsataj. La mondo de la socialismo la unua malfermis la pordojn de la kosmo. La unua homo, ekfluginta tra la interastra spaco, havis kiel startplacon la manplaton de Lenin, tiun manplaton, kiu iam trahakis la mallumon de Rusio kun la historiaj vortoj: „Estas tia partio!“

En tiu mondo, freneza pro militpsikozo kaj amasigo de armiloj, estas unu ekvilibro, lumas unu saĝo. Tiu saĝo nomiĝas Lenin. Al tiu saĝo estas direktitaj la okuloj de la homaro. Ĝian trankvilan pulson la tuta homaro aŭskultas.

ESPERANTO EN PORPACA KONFERENCO

En februaro en Veliko Tŭrnovo okazis distrikta packonferenco. Ĉeestis la prezidanto de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco, k-do Georgi Dimitrov — Goŝkin. En la raporto de la distrikta komitato estis anoncitaj faktoj pri la fruktodona peresperanta paclaboro en urbo Polski Trŭmbeŝ. La prezidanto de la societo Hristo Manolov estis invilita rakonti pli detale pri la komuna agado de la e-istoj kaj pacaktivuloj en P. Trŭmbeŝ. Lia konkreta raporto interesigis multajn ĉeestantojn, ĉar unuan fojon ili aŭdis tiajn valorajn faktojn dum distrikta konferenco de la pacbatalantoj.

Penka Gŭrbuzanova

GRAVA POR KOLEKTANTOJ!

La redakcio de revuo „Kolektanto“ petas pardonon pri la malfruo de n-ro 3—4/1979. Ĝi baldaŭ aperos.

En speciala kunsido la redakcio prenis decidojn pri regula aperado de la revuo estonte.

La abonotizoj por 1980 estas 1,50 lv., sendataj nur per poŝtmandato. De via baldaŭtempa abono dependas la apero de n-ro 1. Estas preferinda kolektiva abono.

La adreso: 1303 Sofio, bul. Hristo Botev 111, Cvetanka Adamova (por „Kolektanto“).

Salutletero de k-do Todor Jivkov al la partoprenantoj en la solena kunveno dediĉe al la 75a datreveno de la naskiĝo de Trifon Hristovski okazinta la 24an de januaro 1980 en u. Botevgrad

EKZEMPLO DE VOLO KAJ KURAĜO

Karaj gekamaradoj,

Oni devas esti naskita kaj kreskinta en la iama subdistrikto Orhanie, regiono nekredeble malriĉa kaj postrestinta, por povi juste pritaksi la heroecon de homoj kiel Trifon Hristovski. Kaj krome, lia persona sorto estis eksterordinare tragika. Vi ne malpli bone ol mi konas lian personan vivon, kiun li tiel sincere kaj severe priskribis en sia lasta libro.

Kiel komunisto, kiel partia aganto, kiel multjara kaj konstanta sekretario de la organizado de Bulgara Komunista Partio en sia naskiĝvilaĝo Radotina, kiel publicisto kaj konsilanto de la junularo en sia naskiĝregiono Trifon Hristovski restas ĝis hodiaŭ ekzemplo de volo kaj

kuraĝo, de obstino kaj sciamo. Arda patrioto kaj internaciisto, kvankam katenita de peza malsano, li trovis vojon por interkomunikiĝi kun homoj el la tuta lando, kun homoj el dekoj da aliaj landoj. Ĉe mi persone la rememoro pri li estas neforgesebla.

Trifon Hristovski forlasis la vivon en la antaŭvespero de la venko de socialisma revolucio, al kiu li fordonis ĉion sian.

Mi salutas vian iniciaton celebri laŭ digna maniero la 75an datrevenon de la naskiĝo de tiu nobla komunisto kaj publicisto, kies nomo kaj fero estas enplektitaj en la heroa historio de Botevgrad-regiono.

TODOR JIVKOV

HISTOVSKI CELEBRITA ANKAŬ EN SOFIO

La sofia e-istaro celebris solene la 75an datrevenon de la naskiĝo de Trifon Hristovski.

La kunvenon malfermis kaj gvidis k-do Nikola Aleksev — persona konato kaj amiko de Hristovski. Pri la heroo vivo kaj batalo de tiu fidela filo de la bulgara popolo parolis k-do Nano Kjuĉukov. Antaŭ la multnombra publiko denove ekstaris la bildo de homo, kiu tutan vivon kontraŭbatalis sian pezan personan sorton kaj la maljustaĵojn de la homa socio ĉe la ka-

pitalismo. Apartan atenton la preleginto dediĉis al la eksterordinare fruktodona E-laboro de Hristovski, por kiu E-o estis, en la strikta senco de la vorto, kontaktilo kun la vasta mondo.

Rememorojn pri Hristovski rakontis ankaŭ Ivanka Gavrilova el u. Bankja, kiu forte impresis la publikon. Estis plenumita belarta programo.

K. V.



For el Eŭropo la „pârşing“- kaj la flugantaj raketoj!

Revuo „Bulgara Esperantisto“ organizas, informas, klerigas, instruas, edukas. Ĝi estas necesajo por ĉiu bulgara esperantisto en lia ĉiutaga agado.

Distriktaĵ kaj societaĵ estraroj,

daŭrigu la varbadon de abonantoj ĝis kiam neniu esperantisto en via loĝloko restos neabonita! Instigu la membrojn abonigi ankaŭ siajn eksterlandajn amikojn! Pere de „Bulgara Esperantisto“ ni gajnu novajn amikojn de nia patrolando, de la paco!

Sumojn sendu al la asocia kancelario!

Ni nepre atingu 6100!

RICA, INSPIRA KAJ FRUKTODONA VIVO

La 15-an de decembro 1979 la sekretario de CE de Bulgara Esperantista Asocio Kunĉo Vălev — ĉefredaktoro de nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto“, entuziasma kaj entuziasmiga lektoro kaj instruisto de Esperanto, senlaca kaj inspira propagandanto de la Internacia Lingvo, arda oratoro kaj deklamanto, amato kaj ĉarmulo de la E-movado en Bulgario — atingis sian 60-jariĝon.

K-do Kunĉo Vălev naskiĝis en vilaĝo Dobromirka, distrikto de Gabrovo (eksa regiono de Sevlievo), en la familio de malriĉa kamparano. La socia vivo en lia naskiĝvilaĝo — vilaĝo kun progresemaj kaj kulturaj tradicioj — ludis favoran rolon por la eduko kaj la formiĝo de la sciama knabo. Precipe gravan rolon ludis tiurilate la lernejana abstinula societo „Zdravec“ (Geranio), kiu donis al li la unuan edukon en spirito de sobereco, de amo al la scio, al la vero, al la popolo. Jam en la fundamenta lernejo li ekamis forte la literaturon kaj manifestis siajn literaturan kaj artistan talentojn.

Post la fundamenta lernejo Vălev daŭrigis sian studadon en la geknaba gimnazio en u. Sevlievo, kiu ĉiam distingiĝis per sia revolucia kaj progresema spirito. Jam lernanto en la unua klaso de la gimnazio li ĉirkaŭprenis arde la marksisma-leninismajn ideojn kaj fariĝis membro de la revolucia Laborista Junula Unuiĝo (RMS); dum la lastaj du klasoj estis membro de ĝia gimnazia estraro. Du klasojn li studis ankaŭ en la gimnazio „Aprilov“ en u. Gabrovo. Tie li lernis E-on en kurso de Radoslav Tričkov, konata E-lektoro el Vraca.

Kiel gimnaziano k-do Vălev estis unu el la plej bonaj lernantoj. En la gimnazio li manifestis plenforte siajn literaturan kaj artistan talentojn, partoprenante en la literaturaj manifestadoj kaj teatraj spektakloj. Li verkis kaj publikis en la lernejanaj gazetoj ardaĵn versaĵojn. Estas bedaŭrinde, ke poste li forlasis la poezion verkadon. En Sevlievo li estis prezidanto de la redakta komitato de la lernejana gazeto „Văzhod“ (Supreniro).

Samtempe li manifestiĝis kiel aktiva kaj sindona socia aganto. En Gabrovo li estis vicprezidanto de la lernejana stenografika societo „Polet“ (Flugo) kaj sekretario de la literatura societo. En Sevlievo li estis prezidanto de la stenografika societo „Skoropis“ (Rapida Skribo) kaj sekretario de la E-societo. Pro siaj societema karaktero, ĉarmeco, larĝa erudicio kaj scipovo labori kun la homoj, enspiri en

ilin noblajn pensojn kaj sentojn, li fariĝis la plej amata kaj estimata en la gimnazio kaj inter la junularo en la urbo, populara inter la progresemaj junuloj en la tuta regiono de Sevlievo. Multajn junulojn li gajnis por nia socialisma afero. En lia naskiĝvilaĝo tuta generacio da junaj homoj edukiĝis kaj formiĝis ideo sub lia influo kaj zorgoj. Mi ankaŭ estas unu el tiuj, kiuj multe ŝuldas al li tiurilate. Mi havis la feliĉon konatiĝi kun li jam en 1938 j., kaj tiam komenciĝis nia sincera amikeco, kiun mi alte aprecas.

Pro sia progresema agado kiel lernanto en la tiama sepa klaso k-do Vălev estis eksigita el la gimnazio de Sevlievo kaj aliĝis al la knaba gimnazio de Veliko Tărnovo. Tie li tuj estigis kontaktojn kun membroj de RMS kaj e-istoj. Baldaŭ tamen la reakcia gvidantaro de la gimnazio en Tărnovo forpelis lin, ĉi-foje por ĉiam el ĉiuj lernejoj de la lando. Nur ĝenerala amnestio en 1937 ebligis al li fini la gimnazion de Sevlievo. Multfoje la junuloj-faŝistoj aranĝis embuskon al li kaj foje grupo de ili atakis kaj vundis lin en la centro de la urbo.

En la aŭtuno de 1938 j., jam fininte la gimnazion, li kune kun grupo de laboristoj-RMS-anoj estis arestita en la policejo de Sevlievo. Post kruelaj inkvizicioj oni liberigis lin. Sed la korpaj traumatoj, kaŭzitaj al li de la inkvizicioj, kaj la malstabila sano sekve de malsaniĝo antaŭ tio pro pusa pleŭrito preparis la grundon por grava malsaniĝo, kies postsekvoj restis dum lia tuta posta vivo. Tamen la malsano ne rompis lian spiriton, liajn entuziasmon kaj ardon. Li helpis la kontraŭfaŝisman batalon diversmaniere.

En 1939 k-do Vălev fariĝis studento de juro en la Sofia Universitato. Dum sia studado li estis devigata labori por vivteni sin. Li aktive partoprenis la batalojn de la progresema studentaro kiel membro de BONSS (Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Unuiĝo), agadis ankaŭ en la RMS-societo en sia naskiĝvilaĝo. Ĉie, kie li aperis, li varbis novajn adeptojn por la afero de la socialismo.

Post la popola venko je la 9. IX. 1944 k-do Vălev donis sian neelĉerpeblan energion kaj junulan ardon al la konstruado de nova vivo kaj por la triumfo de la E-movado en nia lando. Lia oratoria talento trovis vastegan teron de apliko serve al la batalo por plena venko de la socialisma socio en la lando. Post la 9. IX. 1944 li ŝanĝis sian fakultaton en la universitato, ekstudis kaj finis la fakon de bulgaraj lingvo kaj

literaturo — lia ŝatata fako. Ĉi tie li estis unu el la fondintoj de la Ĝenerala Popola Studenta Unuiĝo kaj membro de ĝia fakultata estraro.


Post sia diplomigo k-do Vălev oficis du jarojn kiel gimnazia instruisto, unu jaron — kiel redaktoro en la literatura fakto de Radio Sofio, poste instruisto de bulgaraj lingvo kaj literaturo en la Milita-Politika Akademio, tri jarojn kiel ĉefredaktoro en la Eldonejo de la Unuiĝo de Bulgara-Sovetaj Societoj kaj dudek jarojn kiel redaktoro en la Eldonejo de Patrolanda Fronto. Dum tiu ĉi periodo li ankaŭ tradukis — aperis pli ol 15 libroj, tradukitaj de li el la rusa lingvo. Li ankaŭ estis aktiva sociaganto: ĉefo de kultura-kleriga fakto de regiona komitato de Patrolanda Fronto, sekretario de baza organizaĵo de BKP, prezidanto de sindikata komitato.

Grandegaj estas la meritoj de k-do Vălev al la E-movado, al kiu li dediĉis multe da energio kaj tempo. En tiu ĉi kampo de sia publika aktivado li laboris kun plej grandaj amo kaj sindonemo. Oni povas diri, ke la laboro por kaj per E-o fariĝis senco de lia vivo. Lia E-aktivado estis diversflanka, ĉiam efika kaj fruktodona.

Dum la periodo 1955–1959 li estis prezidanto de la Sofia urba E-societo „Maksim Gorkij“, kiu sub lia gvido disvolvis aparte aktivan kaj riĉenhavan agadon. Multajn jarojn li estis prezidanto de la Sofia Instruita E-societo „Diĉo Petrov“ kaj prezidanto de la Sofia grupo de e-istoj filologoj. Laŭ lia iniciato estis aranĝitaj multege da interesaj prelegoj pri problemoj de la esperantologio kaj interlingvistiko.

Ekde 1956 k-do Vălev kiel membro de la CE de BEA ses jarojn estis respondeculo pri ties kultura-kleriga agado. En 1975 li estis elektita kiel sekretario de la CE de BEA. En tiu ĉi funkcio li disvolvis kaj daŭre disvolvas treege aktivan kaj abnegacian agadon.

Por k-do Vălev la instrulaboro estis ĉiam la plej ŝatata okupo. Jam kiel mezlernejo li gvidis E-kursojn en la gimnazio de Sevlievo kaj en sia naskiĝvilaĝo. Kiel studento kaj poste li konstante gvidis E-kursojn por studentoj kaj civitanoj en Sofio. En 1964 li per konkurso estis enoficigita kiel honorariata lektoro de E-o en la Sofia Universitato kaj jam 16 jarojn forĝas tie kadrojn por la E-movado en nia lando. En 1969 li estis unu el la iniciatintoj de la forestaj (korespondaj) E-kursoj, organizitaj de la Distrikta-Urba Estraro de BEA en Sofio, kaj rektoro de la someraj E-kursoj en Burgas. Li elstaris kiel unu el la plej



CELEBRO DE KUNČO VALEV

Je la 27a de februaro okazis solena celebrazo de la 60-jara datreveno de la naskiĝo de nia elstara bulgara e-isto k-do Kunčo Valev. En la granda salono de la Sindikato de Konstrulaboristoj „Penju Penev“, bul. „Hristo Botev“ 71 kolektiĝis ĉ. 300 e-istoj el Sofio kaj el diversaj loĝlokoj de la lando.

Raporton pri la vivo, agado kaj speciale pri la E-agado de la jubileulo faris Dimitro Haĝiev. Li substrekiis la gravan rolon, kiun multajn jarojn ludas Kunčo Valev en la bulgara E-movado. Granda estas lia kontribuo kiel pedagogo, aŭtoro de lernolibroj, gramatiko kaj instruhelpiloj. Aparte grava estas lia laboro kiel E-jurnalisto. Multaj publikaĵoj — originalaj kaj tradukitaj — apartenas al lia plumo. Jam dekdu jarojn li seninterrompe estas ĉefredaktoro de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“, kiu atingis notindajn sukcesojn.

Je la nomo de la Centra Estraro de BEA la jubileulon salutis Hristo Gorov — la prezidanto. Li tralegis la dekreton de la Ŝtata Soveto pri honorigo de K.

bonaj E-instruistoj en la lando kaj plene meritas la aljuĝitan al li titolon „elstara lektoro“. K-do Valev ĉiam rilatas kun amo kaj estimo al siaj kursanoj, sukcesas entuziasmigi kaj varbi ilin por la E-movado. Centoj de liaj kursanoj fariĝis bonaj e-istoj kaj gvidantoj de nia landa E-movado. Lia famo de elstara pedagogo delonge transpasis la limojn de nia lando.

K-do Valev elstaris ankaŭ kiel eminenta metodikisto de E-instruado. Dum la lastaj dek jaroj li gvidis multajn metodikajn kursojn por E-instruistoj kaj lektoroj. En 1978 liaŭ invito de Helena E-Asocio li gvidis dusemajnan E-kurson en Ateno kun akcento sur la metodikan aspekton. En la fino de 1979 liaŭ invito de la e-istoj de Leningrado li gvidis du dusemajnaj E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj same kun akcento sur la metodikan aspekton. Per tiuj kursoj kaj per kvar propagandaj kunvenoj en la belega urbo de Lenin li kontribuis por plifirmigo de la amikeco kaj kunlaboro inter la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj.

Grava estas la kontribuo de nia jubileulo por E-o per lia verkada aktivado, ligita kun la disvastigo de E-o. Li eldonis ĝis nun Gramatikon de Esperanto en kunaŭtoreco de V. Oljanov, lernolibron de E-o por korespondaj kursoj ĉe „Vsestranni Uslugi“ kun M. Langov, memstare lernolibron de E-o por la korespondaj kursoj de la Sofia DUE de BEA kaj lernolibron de E-o por lernantoj en kunaŭtoreco de Jordan Markov kaj Ivan Sarafov. Ĝis la fino de j. k. aperos fundamente relaborita lia lernolibro de E-o por ĉeestaj kaj forestaj kursoj. Li ankaŭ redaktis la lernolibron de E-o de S. Hesapčiev kaj I. Sarafov.

Nia jubileulo laboras ankaŭ en la kampo de la leksikografio. Nun kune kun prof. S. Ĝuĝev li finredaktas la Bulgara-esperantan vortaron. Li estas ankaŭ unu el la aŭtoroj de la Esperanto-bulgara vortaro, kiu aperos en 1981.

Aparte valorega estas la aktivado de k-do Valev kiel ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Li okupas tiun ĉi postenon jam 12 jarojn

Valev per la alta ordeno „Naŭa de Septembro“ kaj enmanigis al li memordonacon. La jubileulon gratulis ankaŭ: Violin Oljanov — prezidanto de Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj, Ljubomir Miĥajlov — el la partia organizo ĉe la CE de BEA, Haim Levi — el la redakta Komitato de „BE“, reprezentantoj de distriktaj estraroj de BEA (Hristo Kanev — Sofio, Petko Arnaudov — Pazargik, Jordan Jordanov — Smoljan, Fani Mohajlova — Plovdiv, Boris Kavalĝiev — Ruse, Cvetana Zareva — Pernik, Kina Prodanova — Gabrovo k. a.), reprezentantoj de E-sekcioj de BEA (Vasil Bozarov — instruistoj, d-ro Stojan Moraresku — medicinistoj, Dimitro Papazov — junuloj, prof. Metodi Popov — sciencistoj, Asen Grigorov — literaturistoj k. a.), Bulgara Esperantista Kooperativo, la Ĥoro de la Sofiaj E-istoj, la redakcio de „Interligilo“, la Internacia E-Kurso, en la nomo de la sofiaj E-societoj (urba, instruista, poŝtista, aŭtotransporta, fervojoista, junulara, medicinista, blindula), eksaj kaj nunaj lernantoj kaj apartaj samideanoj el diversaj loĝlokoj. Ĉiuj alte aprezis la laboron de k-do Valev kaj liajn kvalitojn kiel kolego, kamarado, esperantisto kaj homama homo, esprimante al li estimon, amon kaj sinceran dankon. Sur la tablo antaŭ la jubileulo impone amasiĝis floroj kaj memordonacoj.

Multaj gratuletoj kaj telegramoj estis ricevitaj — oni tralegis kelkajn.

Profunde emociita k-do Valev dankis al ĉiuj gratuloj per varmaj vortoj. Li diris, ke ĉi-vespere li estas la plej riĉa homo, riĉa je homa amo. Solene sonis lia deklaro, ke ĝis la lasta spiro per ĉiuj fortoj kaj energio li laboros kaj batalos por la triumfo de E-o, de la internacia amikeco kaj paco, de la socialismo kaj humanismo.

La solenaĵo finiĝis per belarta programo, kiun partoprenis nur eksaj E-lernantoj de k-do Valev. Recitis Jorjeta Zdraveva, Vasja Petrova, Vera Vajarova, Kantis Karamfilka Adamova, Dimitro Denčev, Veselin Damjanov. Akompanis per piano Jivka Dekova. D. Denčev tralegis propran versajon, dediĉitan al la jubileulo.

La celebrazo transformiĝis en feston ne nur por k-do Kunčo Valev, sed ankaŭ por la tuta bulgara esperantistaro.

Dimitro Nedjalkov

kaj rompis la rekordon pri tempo-daŭro de redaktoreco de la revuo. Sub lia redaktoreco la revuo estis plibonigita kaj variigita laŭ enhavo kaj ekde la komenco de 1980 pligrandigita laŭ formato. Samtempe k-do Valev zorgis pri la pligrandigo de ĝia eldonkvanto, kiu kreskis de 3 500 en 1968 ĝis 6 100 ekzempleroj dum la lastaj jaroj. El sub lia plumo aperis multaj ĉefartikoloj, artikoloj pri diversaj temoj, informoj kaj tradukoj de literaturaj, distingigantaj per modela E-stilo.

La propagando estas ankaŭ treege ŝatata agadkampo de k-do Valev. Li ĉiam kaj ĉie tre lerte kaj sentrude propagandas E-on. Lia posteno de sekretario de la CE de BEA ebligas al li plene dediĉi sin al la propaganda agado kaj aplikii sian oratoran talenton. Li ĉiam tre konvinke kaj impone parolis en multaj kunvenoj en diversaj loĝlokoj tra la lando. Per siaj oratora talento, elokventeco kaj granda erudicio li ĉiam bone regas la publikon kaj varbas adeptojn de E-o. Liaj paroladoj kaj prelegoj

antaŭ la sofiaj e-istoj ĉiam transformas la kunvenojn en festojn. Ofte li estas ĝuinda deklamanto de E-o poezio kaj aranĝanto de belartaj programoj.

K-do Vălev estas elstara figuro ankaŭ en la internacia E-movado. Membro de la Komitato de UEA, li partoprenis la universalajn kongresojn de E-o en Sofio, Budapeŝto, Vieno, Londono, Belgrado, Hamburgo, Ateno, Varno. Li partoprenis ankaŭ multajn internaciajn E-aranĝojn. Grava estas ankaŭ lia aktivado kiel multjara ĉefdelegito de UEA. Cie, kie li estis eksterlande, li gajnis amikojn por nia socialisma lando.

Kiel homo k-do Vălev distingiĝas per ege valoraj virtoj. Antaŭ ĉio tio estas lia komunista humaneco, liaj bonkoreco kaj honesteco. En siaj rilatoj al la homoj li estas sincera, afabla kaj senpera. Li amas la homojn kaj ili reciprokas lian amon. Per tiuj virtoj kaj per sia ĉiam bona humoro kaj ĉarmaj kantoj k-do Vălev kreas sinceran atmosferon ĉirkaŭ si. Li laboras kun komunista pasio kaj junula ardo por la plenumo de ĉiu tasko, komisiita al li, donante la maksimumon. La laboremo, la mirindaj laborkapablo kaj persistemo en la laboro estas aliaj karakterizaj trajtoj de nia jubileo. Estas granda feliĉo kaj fiero por la E-movado en nia lando, ke ĝi havas en siaj vicoj aganton kaj gvidanton kun tiaj altaj kvalitoj.

Pro meritoj en la kampo de la kultura-kleriga agado k-do Vălev estis honorita per la ordeno „Kiril kaj Metodi“ kaj pro meritoj en la konstruado de la socialismo — per la medalo „25 jarojn de popola regpotenco“. Nun nia popola ŝtato honoris lin per la alta ordeno „Naŭa de Septembro“.

Gratulante lin lige kun lia 60-jara jubileo, ni tutkore deziras al li ankoraŭ longan kaj feliĉan vivon, fortikan sanon, multajn kreivajn fortojn, vicleon kaj plujajn sukcesojn en la nobla por-kaj peresperanta agado kaj en lia agado en la ceteraj kampoj. Kiel ĝis nun li estu ĉiam entuziasmaplena kaj kun junula spirito!

LA BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

En februaro la Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK) havis sian jarkunvenon. En la raporto de la Administra Konsilio, farita de la prezidanto de BEK Ivan Ivanov, estis bone analizita la laboro de la bazaj fakoj de la kooperativo — komercio kaj produktado.

Dank'al plena mobilizo de la fortoj de la kolektivo la plano pri la gajno estis plenumita je 121%. Kreskis la nombro de la kooperativaj magazenoj en la ĉefurbo — ili jam estas 16. Per siaj ŝildoj kaj agado ili bone propagandas E-on en la urbo. Funkcias 18 laborbrigadoj.

En la jarkunveno estis aparte diskutita la E-agado de la kooperativo. Oni konstata, ke en la magazenoj paralele kun la tradiciaj kancelarivaroj estas vendata riĉa sortimento de infanludiloj kaj memoraĵoj kun E-temoj, E-literaturo k. a. Oni proponas diversspecajn E-insignojn, gramofondiskojn kun E-kantoj de Mišo Zdravev kaj Veselin Damjanov k. a.

Por la laborantoj en la diversaj fakoj de BEK estis organizita E-kurso. Inter tiuj, kiuj sukcese finis ĝin, estas ankaŭ 9 komerclaboristoj, kio aparte gojigas, ĉar ĝi plibonigas la priservadon de la klientoj ankaŭ en E-o.

Ĉiam pli bona fariĝas la materiala bazo de la E-a tendarlernejo apud v. Drujevo (Balkano), plibonigas ĝia tuteca laboro. Decidan financon helpon por tio havas BEK. Ekde la 3 de junio ĝis la 14 de septembro 1979 tra la tendarlernejo trapasis 170 gekursanoj (plejparte lernantoj el Sofio, Plevno, Kazanlak, Burgas k. a.).

Dum la raportita periodo BEK unufoje aperis en la internacia merkato, realigante valutan planon de 10 000 levoj. Tiu ĉi agado nun triobligos. En la eksporta listo, paralele kun la altkvalitaj pupoj en interesaj folkloraĵoj kostumoj, aperos ankaŭ aliaj varoj.

BEK estas stabila ekonomia unuo, kies kapitalo jam superas 1 milionon da levoj (en banko kaj en varoj).

Organize, laŭ la karaktero de sia laboro (ekonomia), ĝi apartenas al la sistemo de la Bulgara Kooperativa Unuiĝo. Sed samtempe ĝi helpas la E-agadon de BEA, apartigante nomrimedojn por diversaj iniciatoj, proponante E-literaturon, E-varojn kaj diversajn esperantajjn al la publiko.

Plenuminte tre bone la planon por la pasinta jaro, nun la kolektivo de BEK promesis plenumi la planon por la sepa jarkvino ĝis la 30 de oktobro 1980 laŭ ĉiuj kvantaj kaj kvalitaj indicoj.

La e-istoj sincere deziras novajn sukcesojn al la kolektivo de Bulgara Esperantista Kooperativo!

Dimitro MUTUŠEV

CELEBRO DE RAJNA KONSTANTINOVA

La 12an de marto la sofiaj e-istoj ame kaj estime celebris la 60-jariĝon de Rajna Konstantinova — sindona e-istino kaj konata E-verkistino. Pri ŝia vivo, E-agado kaj verkaro parolis Kunĉo Vălev. Li notis, ke ĝis nun Konstantinova aperigis pli ol 70 materialojn — raportojn, skizojn, rakontojn, tradukaĵojn k. a. — en pli ol 8 periodaĵoj. Kelkaj el tiuj materialoj aperis ankaŭ en diversaj nacilingvaj periodaĵoj, tradukitaj el E-o. Pro ili ĝis nun ŝi ricevis rekonon de multaj elstaraj E-literatoj kiel E-poetino Marjorie Boulton, la skota E-verkisto William Auld — nun jam prezidanto de la Akademio de E-o, John Francis, Asen Grigorov, Simeon M. Simeonov k. a.

La preleganto substrekiis la profundan humanismon de la verkaro de Konstantinova, ŝian sinceran simpatian al la ordinaraĵoj — la veraj kreantoj de la vivnecesaj valoroj. Modesta laŭ amplekso estas la verkaro de Konstantinova, sed riĉa laŭ enhavo kaj altnivela laŭ stilo — klara, simpla, Zamenhofa.

Post la prelego sekvis gratuloj al k-dino Konstantinova fare de reprezentantoj de E-organizaĵoj kaj apartaj samideanoj. Per kortuŝaj vortoj ŝi respondis al la gratuloj kaj bondeziroj.

La artistino Belka Beleva tralegis emocie ŝian rakonton „Blanka rozo“.

A. B.



LA ANTAŬKONGRESA KONKURADO EN MARŜO

En la antaŭkongresa konkurado aktualas la sumigo de la kursaj rezultoj dum la unua semestro. Ni atentigas, ke poentoj estas aljuĝataj nur por tiuj kursoj, kiuj finiĝas per ekzamenoj. Nur malmultaj societoj sendis informojn pri la internacia korespondado de sia membraro. La pligrandigo de la membraro por 1980 kompare kun 1978 ankaŭ alportas poentojn.

Nia bilanco limiĝas ĝis la 14-a de marto. Sekvonta informo (lasta) pri la marŝo de la konkurado aperos en la juna numero.

UNUA KONKURGRUPO

(La E-societoj en la distriktaĵoj plus 5 s-etoj en aliaj urboj)

Gradigo	Loĝloko	Societo	Poentoj
1.	Ruse	„Libero“	235
2.	Sofia	„M. Gorkij“	131.5
3.	Gálábovo	„Kolombo de la Paco“	118
4.	Pazarĝik	„Radio“	115
5.	Kubrat	„Progreso“	97
6.	Jambol	„M. Gorkij“	92.5
7.	Trojan	„Balkana Stelo“	78
8.	Pleven	„Eterna Amikeco“	75.5
9.	Plovdiv	„Kulturo“	70
10.	ŝumen	„Vekigo“	46.5
11.	Kazanlák	„Roza Valo“	35
12.	Vraca	„Sukceso“	28
13—14.	Burgas	„Nigra Maro“	27
	Tárgovište	„Verda Eskadrono“	27
15.	Varna	„Albatroso“	26.5
16.	Pernik	„Nova Vojo“	18.5
17.	Stara Zagora	„Verda Stelo“	18
18—19.	Kjustendil	„Flamo“	13
	Loveč	„Espero“	13
20.	Ĥaskovo	„Asen Zlatarov“	12.5
21.	Kárgali	„Stelo“	12
22.	V. Tárnovo	„Lumo“	4.5
23.	Gabrovo	„Verda Torĉo“	4
24.	Smoljan	„Kulturo“	3
25—26.	Blagoevgrad	„Espero“	2.5
	Dimitrovggrad	„G. Dimitrov“	2.5
27—28.	Sliven	„Espero“	2
	Vidin	„Espero“	2
29.	Tolbuhin	„Paco“	1
30.	Razgrad	„L. L. Zamenhof“	0.5

DUA KONKURGRUPO

(En la aliaj lokoj kaj laŭ profesio E-societoj)

1.	Velingrad	„Stoju Kalpazanov“	361.5
2.	P. Trámbeš	„Progreso“	112
3.	Drjanovo	„Ivan Vladkov“	52
4.	Sofia	„Heroldo“ — poŝtistoj	35
5.	Sofia	„Ĥr. Botev“ — fervojistoj	29
6.	Orjaĥovo	„Georgi Stanev“	28.5
7.	Sofia	„L. L. Zamenhof“ — medicinistoj	28
8.	Pomorie	„Trifon Ĥristovski“	22
9.	Popovo	„Homeco“	21
10.	Sofia	„Prospero“ — fervojistoj	20
11.	Ruse	„Ponto de l'Amikeco“ — transportistoj	20.5
12.	Pavel Banja	„Supreniro“	19.5
13.	Karlovo	„Vasil Levski“	19
14.	Sofia	„Diĉo Petrov“ — instruistoj	18.5

15.	Asenovgrad	„David Sasonov“	18
16—17.	v. Dálboki	„Marko Ivanov“	17
	Bansko	„Pirinmontaro“	17
18.	Dospat	„Fajrero“	16
19.	Bjala	„Paco“	15
20.	Plovdiv	„Lumo“ — blinduloj	11
21.	Nova Zagora	„Edmon Priva“	10.5
22—25.	Ajtos	„Ondo“	10
	v. Batišnica	„Vilaĝa Voĉo“	10
	Panagjurište	„Nova Stelo“	10
26—27.	Provadia	„Oveĉ“	10
	Samokov	„Rila Esperantisto“	9
28—29.	Svištov	„Danuba Stelo“	9
30.	Rila	„Libero“	6
31.	Stanke Dimi-		
	trov	„Marek“	6
32—41.	Svoĝe	„Amikeco“	3
	Marica	„Trakia Lumo“	1.5
	Berkovica	„Verda Stelo“	1
	Ĉepelare	„Diĉo Petrov“	1
	G. Orjaĥo-		
	vica	„Espero“	1
	G. Orjaĥo-		
	vica	„Fervojista Impeto“	1
	Isparih	„Progreso“	1
	Koĉerinovo	„Aŭroro“	1
	Máglj	„Septembra Gloro“	1
	Madan	„Bjalistok“	1
	Smoljan —		
	kv. „Ustovo“	„Bratan Šukerov“	1
	Trjavna	„Verda Standardo“	1
42—43.	Nikopol	„Pelko Simeonov“	0.5
	Septemvri	„Aŭroro“	0.5

TRIA KONKURGRUPO

(Studentaj, lernejanaj E-societoj kaj grupoj)

1.	Vidin	„Junulara grupo ĉe s-to“	74
		„Espero“	22
2.	Sofia	„Vela Peeva“ — studenta	22
3.	Sofia	„Vasil Levski“ — junulara	21
4.	Preslav	„L. L. Zamenhof“ — lernejana	17
5.	Plovdiv	„Studenta Impeto“	12
6.	Vraca	„Verda Raketo“ — lernejana	4
7.	Smoljan	„Flugo“ — studenta	2
8—9.	Ruse	„Verda Stelo“ — lernejana	1
	V. Tárnovo	„Flamo“ — studenta	1

KVARA KONKURGRUPO

(Uzinaj kaj oficejaj E-societoj)

1.	Preslav	„Ivan Kándeŭ“ — uzina	26.5
2.	ŝumen	„Prospero“ — uzina	9
3.	Sofia	„48-a Universala Kongreso“ — uzina	6
4.	Varna	„Fajrero“ — oficeja	4

KVINA KONKURGRUPO

(Asociaj sekcioj)

1.	Instruista	22
2.	Literatura	14
3.	Fervojista	13
4.	Poŝtista	4
5.	Filologa	2
6.	Jurnalista	1

SUKCESA REGIONA E-KONFERENCO

Urbo Kubrat estis inda gastiganto de la unufoje okazinta regiona konferenco de la E-junularo el Nord-orienta Bulgario je la 23-24a de februaro ĉ. j. Ĝi kunvenigis ĉ. 100 partoprenantojn el Varna, Tolibuhin, Ruse, Razgrad, Gabrovo, Plevan, Ispirih, v. Branicevo (distr. de Ŝumen), Gălabovo kaj Kubrat.

Sabate je la 15a horo la plejmulto de la partoprenantoj estis jam priservitaj en la modele funkcianta akceptejo. En la urba kinejo oni spektis atentokaptan koloran filmon pri Kubrat. Sekvis oficiala malfermo en la salono de la Kulturdomo. La prezidanto de la loka E-societo „Progreso” Hristo Dimitrov inaŭguris la renkontigon kaj donis la parolon al la unua sekretario de Komsomolo Vasil Stanev. Tiu bonvenigis la partoprenantojn kaj substrekiis la gravan rolon de la kubrataj e-istoj en la urba sociopolitika kaj kultura vivo. En la nomo de BEJ salutis k-do D. Papazov, kiu emfazis la neceson de similaj regionaj konferencoj por interŝanĝo de spertoj. Sekvis helarta programo de amatoraj ensembloj el la gimnazio de Kubrat. Je dispono al la partoprenantoj estis fotoekspozicio „Bulgara renesanca arkitekturo” de la e-isto Enčo Balanov el u. Gorna Orjahovica. La sabata programo finiĝis per komuna vespermanĝo kaj diskoteko en halo de la kulturdomo.

Dimanĉe antaŭtagmeze sub la gvido de D. Papazov okazis konferenco, kies ĉefa celo estis interŝanĝo de spertoj kaj agadformoj inter la partoprenantaj junularaj E-sekcioj kaj grupoj. Kanju Kanev el u. Gălabovo legis raporton pri la varia kaj imitinda junulara aktiveco en E-societo „Kolombo de la Paco” — E-kursoj, printempaj kaj abiturientaj baloj, amuzvesperoj, aktiva partopreno en la urbaj sociopolitikaj iniciatoj, partopreno en enlandaj kaj eksterlandaj E-arangoj ktp.

La enhaviĉa raporto provokis viglan diskutadon. Liljana Gavrilova, prezidantino de la junulara sekcio de E-societo „Albatroso” en Varna, rakontis pri la ĉiusemajnaj kunvenoj de la sekcio, pri farita enketo pri novaj iniciatoj kaj agadformoj. La junulara

sekcio kunlaboras kun turista societo kaj emas krei kontaktojn kun specialigitaj laborrondoj por variigi la agadon.

M. Janeva el u. Gabrovo parolis pri vigligo de la junulara E-agado en la urbo kaj pri fondigo de junulara E-societo „Evtim Apostolov” ĉe la panfabriko. Ĝi jam havas 16 membrojn.

Hristo Dimitrov el Kubrat informis pri la aktiva partopreno de la gejunuloj en la preparlaboroj por la ĉiujara VARE, pri ties amikaj kontaktoj kun slovakaj e-istoj.

Emilija Kanjovska el Plevan esprimis la strebon de la gejunuloj el la studenta medicinista E-societo al lingva perfektigo kaj serĉado de novaj agadformoj konforme al la laŭgaj interesoj kaj bezonoj.

La partoprenantino el Ruse Binka Siškova rakontis pri la fondita antaŭ nelonge junulara E-sekcio ĉe la urba junulara domo. Al ĝi aliĝis 60 gejunuloj. Ili aparte aktivas en la preparlaboroj por okazigo de PARE en aprilo. La E-sekcio strebas altigi la lingvan nivelon de la membroj kaj krei kontaktojn kun junularaj E-societoj kaj grupoj enlande kaj el ĝemelaj urboj eksterlande.

Ampleksan resumon faris la prezidanto de BEJ Dimitro Papazov. Li emfazis la jenajn direktojn en la junulara laboro:

- propagando de E-o inter la junularo, eliro el la fermita societa vivo kaj aktiva kunlaboro kun sociopolitikaj organizaĵoj, aparte kun Komsomolo, Patrolanda Fronto kaj Popolaj Leĝejoj;

- perfektigo en la lingvo kaj variigo de la kunvenoj;

- preparo de novaj gvidaj kadroj;

- ligo de la E-agado al entreprenoj, institucioj kaj lernejoj kaj fondo de E-sekcioj;

- variigo de la agadformoj kaj serĉado de novaj, pli efikaj formoj, utiligo de la spertoj de „kolomboj de la paco” el u. Gălabovo.

Tagmeze la tre utila konferenco estis fermita. Ĉiujn kontentigis la modela kaj preciza organizo fare de la lokaj e-istoj.

Hristo Dimitrov
Evgeni Georgiev

GRANDA JUBILEA JUNULARA KUNVENO EN VIDIN

Vigle laboras la junulara sekcio de E-societo „Espero” en Vidin. Dank’ al tio oni jam sentas la ekziston de la e-istoj en la socia kaj kultura vivo de la urbo.

Notinda iniciato de la junulara E-sekcio estis la granda junulara kunveno en februaro. Ĝi okazis en la Junulara Domo. Ĉeestis pli ol 250 junaj homoj, plejparte mezlernejanoj. Organizan helpon por la kunveno la e-istoj ricevis de UK de komsomolo.

Pri la lingva problemoj en la nuntempa mondo parolis k-do Kunčo Vălev, sekretario de BEA. Kolor-diapozitivojn pri Islando kaj la UK de E-o en Rejkjavik projekciis k-do Nikola Bojilov el Sofio.

La kunvenon malfermis kaj gvidis Verĵinija Dokova — prezidantino de la junulara sekcio.

Entuziasme propagandas Esperanton kaj gvidas E-kursojn k-dino Nadja Bosanska en u. Orjahovo (sur la foto).





Ildiko Tordasi

Aavo Pikkuus

Anatolij Karpov

Dum la lastaj jaroj estis faritaj pluraj kampanjoj por ekuzo de Esperanto en la internacia sporta vivo. Kompreneble, tiuj kampanjoj ne povis tuj alporti plenan sukceson, tamen ili ne estis senfruktaj: ili helpis formi favoran por ni publikan opinion en sportistaj rondoj. Pravas tion ankaŭ la suba intervju-serio, kun sportistoj, konataj de centmilionoj da homoj en la tuta mondo.

NIAJ DEMANDOJ:

1. Kion vi sentis kaj pri kio vi pensis dum la Montrealaj olimpiaj ludoj, kiam vi deziris konversacii kaj amikiĝi kun sportkamaradoj, havantaj alian gepatran lingvon, resp. parolantaj alian fremdan lingvon nekonsiderante al vi?

2. Kiel vi opinias pri la antaŭaj manifestadoj de diversnaciaj olimpiaj ĉampionoj kaj sportgvidantoj, ke oni devus utiligi ankaŭ en la internacia sporta vivo la internacian lingvon Esperanto, kiu havas profundan parencecon kun la olimpia ideo kaj estas alproprigebla pli facile kaj rapide ol ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj?

3. Por konkordigi tion, ĉu ne estus dezirinda, ke la Internacia Olimpia Komitato (IOK) turnu sin al la naciaj kaj internaciaj sportaj organizaĵoj kun alvoko kaj propono, ke ili organizu E-lingvokurson por la sportistoj, ke la Olimpiko en Moskvo estu ne nur la nova scenejo de konkursoj, sed samtempe ankaŭ granda renkontiĝo de tiuj, kiuj jam komprenas unu la alian?

ILDIKO TORDASI, individua olimpia ĉampiono de virina rapir-skermo:

1. La kolera tumulto de olimpiaj ludoj kvazaŭ ŝas en si fabelmondojn kaj oni ŝatus enrigardi, ekkoni ĝiajn figurojn kaj ankaŭ sin mem iomete enmeti en la magian tumulton. Sed levigas granda baro, ke ne ekzistas komuna lingvo, per kiu ni ĉiuj komprenus unu la alian. Vere, parto de la junuloj hodiaŭ jam parolas iel-tiel unu-du lingvojn, tamen helpe de tio nia vorto ankoraŭ ne povas atingi ĉiujn orelojn.

2. Mi treege konsentas la iniciatojn de tiuj, kiuj ŝatus utiligi E-on ankaŭ en la internacia sporta vivo, ĉar estas eksterordinare facile alproprigi ĝin, ja ĝi estas vivanta internacia lingvo, evoluigita el naciaj lingvoj, kvazaŭ nuntempa latino; kaj ankaŭ ĝia muziko estas orekareza.

3. Estus tre bone, se IOK akcelus ĝin kaj oni aranĝus E-lingvokursojn jam antaŭ la olimpiaj ludoj de Moskvo. Miaflanke mi subtenus ĉi tiun iniciaton.

AAVO PIKKUUS, olimpia biciklisto, merita sportisto de Sovetunio:

1. La manko de komuna, peranta lingvo, kaŭzas grandan zorgon, problemojn kaj ĉagrenon ne nur ĉiun kvaran jaron, dum la olimpiaj ludoj, sed kvazaŭ ĉiun monaton. Ni vojaĝas multege al diversaj konkursoj kaj ankaŭ al ni ofte alvenas eksterlandaj sportistoj. Mi mem estas eston-devena kaj nian lingvon konas tre malmulta, ja ellerni ĝin estas tre malfacile. Tiel ni devus ellerni la tiel nomatajn mondlingvojn. Sed tio estas preskaŭ nebla: inter la multegaj trejniĝoj, konkursoj jam ankaŭ nun ni apenaŭ havas liberan tempon. Kaj cetere: por ellerni unu mondlingvon, necesas almenaŭ kvin-ses jaroj kaj per ĝi ni povus atingi interkompreniĝon nur en kelkaj landoj. Alie la afero staras kun la de ĉi konata, facila Esperanto.

2. Eble jam miaj antaŭaj vortoj spegulas, ke mi legis plezure tiujn manifestadojn. Tio pli, ke mi jam provis proponi inter miaj estonaj sportkamaradoj: ni okupiĝu pri Esperanto.

3. Mi tute konsentas tiun penson.

ANATOLIJ KARPOV, ŝakisto, internacia grandmajstro, mondĉampiono:

1. Kvankam la Montrealan olimpikon mi ne partoprenis — ja estas komate, ke ŝakistoj havas apartan olimpikon — la menciita demando okupas ofte ankaŭ min. Mi tre ofte vizitas diversajn regionojn de la mondo, pro tio mi ofte baraktas kun la lingvaj malfacilaĵoj. Tiujn okazojn kelkfoje ni provas trakti bonhumore, sed vere estas tre malgaje, ke tia nebla situacio elformiĝis. Feliĉe, krom mia gepatra lingvo mi bone parolas angle kaj ankaŭ germane, tamen ankaŭ tiel mi luktas kun niaj eksterlandaj partneroj pro la reciproka nekomprenejo, precipe en Sud-Ameriko. Vere, ĉiam trovigis interpretistoj en la proksimo, tiel mi povas eviti ĝenajn situaciojn, tamen mi pensas, ke ne tio estas la vera solvo.

2. Mi ĝoje akceptis ĉi tiun deklaron, ĉar ankaŭ mi samopinas. Mi jam aŭdis multe kaj bone pri Esperanto. Havante okazon, mi subtenus la internacian lingvon. Tion mi diras malgraŭ tio, ke mi parolas tri mondlingvojn.

3. Tia alvoko estas ne nur dezirinda, sed eksplicite necesa. Mi opinias, ke la propono de IOK — parolante ŝaklingve — fine povus elmovi la aferon de E-o el la ĝismuna „pat-situacio“ kaj povus certigi bonan bazon por tio, ke dum la sekvaj jaroj ni ĉiam pli ofte povu doni „maton“ al la lingva nekomprenejo inter sportistoj.

El „Hungara vico“
(kun mallongigoj)

La 3an de marto en Taŝkent la e-istoj celebris la 70-jariĝon de Petro Poliŝĉuk — fervora uzbeko E-aganto, poeto, tradukisto kaj senlaca propagandanto de la ideo pri la Internacia Lingvo kiel ponto al interpopola amikeco.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ sincere salutas la uzbekajn e-istojn kaj ties karan jubileon!

PETRO POLIŜĈUK

MIA POEZIA KREDO

Ni povas pri noktoj plenlunaj paroli,
pri kant' najtingala en densa arbaro,
sed antaŭ ĉio ni devas memori,
ke paco eternan soifas homaro!

Ho mia animo, anim' komunista!
Ĉu povas esprimi mi sentojn lirikaĵn,
se kiel rabbestoj turmentas rasistoj
nigrulojn kaj hindojn en Suda Afriko?

Ĉu povas mi mian animon instigi
al pura belarto per la rimedo,
se imperiistoj intencas mortigi
plejparton de l' homoj sur nia planedo?

Ĉu povas okupi mi min pri akuzo,
aŭ verki poemojn pri ama ĉagreno,
se Karter, Bjeĵinski duonefrenezaj,
minacas la homojn per bomb' hidrogena!

Ne, tute ne povas mi esti trankvila
kaj esti al sorto malbona humila,
ĝis kiam ekzistas en mondo fantomo
de tria milito — milito atoma!

Pro tio en miaj versaĵoj mi vokas
homaron al sankta batalo por homo!
Mi vokas — kaj homoj al mi reciprokas:
«Pereu por ĉiam, minaco atoma!»

Ekflugu ĉi vortoj al ĉiu animo,
alvoku ĉi vortoj al lukto por paco!
Ne plu Nagasak! Ne plu Hiroŝima!
Ne plu nin turmentu nuklea minaco!

Mi vidas l'estonton belega kaj klara,
mi vidas feliĉan kaj gajan homaron,
La sento de amo, de am' reciproka,
ja estos spirito de nia epoko!

FONDITAJ FILIOJ DE ASE

Je la 30a de novembro en la Sindikata Palaco de Kulturo en Vilnius okazis konstitua konferenco de respublika filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE) en Litovio. Por prezidanto estis elektita la kandidato de filologiaj sciencoj L. Skupas.

La Litova Filio de ASE estas kolektiva membro de la Litova Asocio de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando.

La 29an januaro 1980 estis fondita Ukraina Respublika Filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj.

La fonda konferenco partoprenis ĉ. 50 delegitoj de ukrainaj E-kluboj el 15 loĝlokoj de la respubliko. Partoprenis ankaŭ la prezidanto de ASE — la doktoro de filologio prof. Mahomet Isaev.

Estis elektitaj gvidorganoj. Prezidantino — la docto en la konservatorio Ekaterina Majburova.

La filio efektivegis sian laboron per la E-kluboj de Ukrainio. Ĝi funkcias sub la patroneco de la Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando kaj kun helpo de la respublikaj sindikataj kaj junularaj organizaĵoj.



Aŭstralio. Revigligis la agado en la ŝtato Sud-Aŭstralio, kie lastatempe la restarigita grupo organizis ekspozicion en elementa lernejo apud Adelaide. Sekvis parolado de unu grupano kun la rezulto, ke la lernejestro mem eklernis kaj planas enkonduki la instruadon de E-o en sian lernejon.

Britlando. Okaze de la lasta parlamenta batalo, la Skota Federacio Esperantista sendis demandaron al la kandidatoj en Skotlando. El 213 kandidatoj alskribitaj respondis 45. El tiuj 45 la plimulto jese respondis al tri demandoj: 1) pri instruado de internacia lingvo kiel dua lingvo al homoj el ĉiuj nacioj; 2) pri instruado de E-o kiel nedeviga ekstra lingvo; 3) „ke ne estu diskriminacio kontraŭ parolantoj de minoritata lingvo, kiel ekz. la gaela, kaj ke akcepto de neŭtrala internacia lingvo helpus protekti iliajn rajtojn“. Krome, pli ol triono deklaris sian pretecon aliĝi al la poresperanta parlamenta grupo.

La Brita Sindikata kaj Kooperativa E-Grupo kunvenis en la brita parlamentejo la 30. 10. 1979. La kunvenon gvidis S. Bidwell, parlamentano, kiu parolis i. a. pri la akriĝo de la lingva demando en la Eŭropa Komunumo pro la baldaŭa aliĝo de Greklando kaj Portugalio.

La Londona Kooperativa Asocio, kiu nombras pli ol unu milionon da membroj, eldonis informbroŝuron en la Internacia Lingvo.

Hispanio. En sia statuto Hispana E-Federacio aprobis paragrafon celantan pligrandigi inter la membroj solidarecon kaj respekton por aliaj popoloj laŭ la senco starigita en la Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

Al la korespondaj kursoj de la Hispana Sekcio de ILEI en Callosa de Segura (Alicante) enskribiĝis 663 personoj. Kursoj de E-o okazas 3-foje semajne en la sidejoj de „Amikoj de Unesko“ en Madrid kaj Barcelona.

Irano. Ĉi-jare en la nedevigaj kursoj de la Universitato de Teheran la sola fremda lingvo instruata estas E-o.

En novembro aperis la sociologiaj lernolibroj por la gimnazioj. En du el ili — tiuj de la unua grado (naua klaso) kaj la tria grado (dekunua klaso) — prof. Saheb-Zamani verkis ĉapitrojn pri E-o: en la unua 7-paĝan kaj en la dua 18-paĝan ĉapitron, kun bela bildo tutpaĝa de Zamenhof, kiun faris irana pentristo. La nomoj de la ĉapitroj estas „Kulturo kaj lingvo“. Nun preskaŭ 1,5 miliono da ĝelernantoj konatiĝas kun E-o.

Japanio. En Japanio troviĝas 4000 organizitaj e-istoj. Supozeble ĉ. 1500 estas ĝejnuloj.

Dum la pasintjara Japana E-Kongreso fondiĝis Esperantista Societo por Homaj Rajtoj, kies celoj inkluzivas helpon al politikaj malliberuloj, luktadon kontraŭ diskriminacio kaj firmigon da la rajtoj de e-istoj. Por pliaj informoj kontakti sin-on Naoko Hata, Sonan 3-7-22, Sagami-hara-ŝi, 228 Japanio.

Kameruno. Por fondi Kamerunan E-Asocion oni bezonas materialojn. Kiu povus helpi, skribu al: J. M. Mboge, Mbele, Pk. 1816, RC. 2267, Douala, Kameruno.

Svedlando. Sveda E-Federacio proponis, ke UNO aŭ UNESKO nomu 1987 la Jaron de Internacia Lingvo lige kun la 100-jara jubileo de la unua lernolibro de E-o.

LA NESUFICE KONATA ZAMENHOF

Canko Murgin

El ideologia vidpunkto d-ro L. L. Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo E-o, ekzistas paralele en duobla aspekto: konata kaj nekonata, oficiala kaj ne-oficiala, pacema kaj revoluciema, vaganta tra la miasmaj marĉoj de la kapitalismo, sed pli kaj pli ofte turnanta rigardon maldekstren al la novepoka aŭrore de la socialismo. Surbaze de kio ni asertas tion?

1. Ekde januaro 1895 Zamenhof fariĝis plena posedanto (redaktoro kaj eldonisto) de la internacia presorgano „Esperantisto“, presata en Germanio. En februaro samjare la cara cenzuro ordonis malpermeson kontraŭ la importado de tiu gazeto en Rusion. Laŭ la ĝisnunaj versioj tio okazis pro la publikita Tolstoj-artikolo „Kredo kaj prudento“ kaj/aŭ starigita skriba kontrakto pri kunlaboro inter la e-istoj kaj la tolstojista eldonejo „Posrednik“ (Peranto).

Certe neniu dubas, ke la despotismo de la caro deziris detrui tiun kunlaboron, sed samtempe mi deziras atentigi, ke en la februara numero (1895) de tiu gazeto aperis ankaŭ mallonga, preskaŭ nerimarkebla novaĵeto inter la bagatelaj novaĵoj tra la mondo; ĝi temis pri iu metodo, aplikata por malhelpi pagadon de ŝtatimpostoj en Nederlando. La teksto pri la motivoj de la cenzurista malpermeso ankoraŭ ne estas publikita, tamen en la verkaro de L. Tolstoj estas lerto, kiu atestas pri la klopodoj de la fama verkisto ĉe la cenzuro por helpi al Zamenhof, kaj en ĝi estas menciita ankaŭ la novaĵeto el Nederlando.

Mi opinias, ke ekde tiu momento Zamenhof montris sian malkontenton kontraŭ la ŝtato de la ekspluatistoj kaj simpatian al la siamaniere ribelantaj ekspluatitoj. Eble prudaj oficialuloj povus kvalifiki tion kiel hazardan kaj ne malbonintencan kontraŭ la ŝtato de kapitalistoj, sed la fakto restas fakto kaj iom poste ĝi fariĝos des pli valora, des pli grava kaj atentinda, ĉar ĝi ne estas unuopa, izolita fenomeno.

2. En la poemo „Preĝo sub la verda standardo“ Zamenhof prezentas la homaranisman doktrinon en versoj. Tiu poemo formis la finon de lia kongresparolado en 1905. Zamenhof tre satis tiun poemon. Satis ĝin ankaŭ ĉiuj poeziamaj e-istoj, eĉ nun ne malpli ol iam, antaŭ 75 jaroj, kiam ĝi estis ĵus lanĉita.

Kiu estas la sekreto de ĝia ĉarmo? Certe ne tio, ke ĝi estas

homaranisma. Eble tio, ke ĝi simbolas la fratecon kaj la justecon inter la popoloj. Tute certa tamen estas nur tio, ke en ĝi Zamenhof sukcesis muldi la plej altvaloran perleton de la originala E-poezio. Temas pri la lastaj kvar versoj de la kvina strofo:

*Ni inter popoloj la murojn detruos
kaj ili ekkrakos, kaj ili ekbruos,
kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
ekregos sur tero.*

La metodo pri efektivigo de lia ĝistiam ideo pri hilelismo-homaranismo estas de tio evolucia: „iom post iom“, „nerimarkite kaj sen ia rompo“, „nerimarkite kaj sen rekte detrui“, „nenion rekte detrui“, „tamen post longa laboro“, en daŭro de „multaj jarcentoj“, eĉ — jarmiloj.

Al tiu evoluisma metodo Zamenhof dediĉis sian belegan poemon „La vojo“. La esprimoj kiel „paŝo post paŝo, post longa laboro“ aŭ „eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan“, same kiel la antaŭaj evoluismaj esprimoj precize spegulas lian nekompletan mondkoncepton pri la socia disvolvigo. Se ĝuste tiu ĉi metodo estus aplikata por forigi la murojn inter la popoloj, oni devus malmasoni ŝtonon post ŝtono, brikon post briko, sen rekte detrui, sen ia rompo, sed en daŭro de multaj jarcentoj. La limmuroj inter la nacioj kaj ŝtatoj malaperos nerimarkeble, sen bruado, sen krakado. Tio estas la evoluisma metodo.

Tamen en la supre cititaj versoj Zamenhof iras laŭ vojo nekutima por li mem, li aplikas alian, tute kontraŭan al homaranismo metodon — nome la revolucionan metodon. Tiu nova metodo aludas, ke la konstruantoj de la unueca homaro rapide, energie, sinkrone kaj kun tre bona organizo subfosas la murojn inter la popoloj kaj ilin faligos samtempe per surdiga krakado kaj bruado. Tiu urga laborritmo memorigas pri la farata socia revolucio.

Cu hazarde aŭ intence, ĉu erare aŭ konscie, Zamenhof enmasonis en tiu ĉi poemo revolucionan poeziperleton?

Por pli bone orientiĝi pri la problemoj, ni revenu al la historia epoko, en kiu la poemo estas verkita. Estis 1905: la komenco de la eksplodinta kontraŭimperialisma revolucio en Rusio (1905—1907). Resumante la rezultojn el la agado dum 1905 V. I. Lenin pentris kolosajn ŝanĝojn: „En la

printempo de 1905 nia partio estis unuiĝo de sekretaj rondetoj; en la aŭtuno ĝi fariĝis partio de milionoj da proletoj.“ Estas tre konforme al la cirkonstancoj supozoj, ke tiu etoso de revolucia optimismo atingis, kaptis kaj inspiris ankaŭ la aŭtoron de la „Preĝo sub la verda standardo“. Por unua fojo en sia vivo li komprenis, ke la socia disvolvigo konsistas ne nur el evolucio (sur kiu sin bazis la homaranismo), sed ankaŭ el revolucio.

3. La flagranta en Rusio kontraŭimperialisma revolucio (1905—1907) vekis ĉe Zamenhof grandajn esperojn pri alveno de pli favoraj kondiĉoj kaj instigis lin ne nur malkaŝi sian simpatian al ĝi, sed ankaŭ imperitive alvoki: „Rompu, rompu la murojn inter la popoloj... nur tiam povos malaperi tiuj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.“ (Genevo, 1906). En Kembrigo 1907 ŝajne ne sufiĉis la dufoje ripetita alvoko pri „rompado de la muroj inter la gentoj“, tial li eĉ trian fojon vivuas en la fino de sia kongresparolado pri „ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj“.

La trijara periodo (1905—1907) de skuado, krakado, bruado kaj rompado de la muroj inter la nacioj estas kronita per sagaca prognozo pri pereado de kapitalismo kaj vigla aludo pri alveno de nova epoko en la vivo de la homaro, kiam ne plu homo por homo estos lupo, kiam ne plu ekzistos naciaj, internaciaj, interŝtataj kaj klasaj problemoj, kiam la tuta unuiĝinta homaro batalos komune nur kontraŭ la fortoj de la naturo por perlabori siajn panon kaj feliĉon: „Longe daŭros ankoraŭ malmola nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti upoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si... ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiuj egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo.“ (Londono, 1907).

Tiu optimisma bildo pri la ŝtato de la estonta homaro malkaŝas al ni minimume tri gravajn aferojn: 1) ke Zamenhof pentris ĝin sub la inspira influo de la verkoj de la grandaj proletaj ideologoj Karlo Marks kaj Frederiko Engels; 2) ke sub „rompado de la muroj“ inter la popoloj ĉi tie por unua fojo Zamenhof inkludas ne nur solvon de la problemoj en

la internacia kaj interŝtata sfero (pri stabila internacia paco, pri kontraktoj per komune akceptita planlingvo ktp.), sed ankaŭ solvon de la interklasa antagonismo interne de ĉiu nacio por nenigo de kapitalismo kaj per fundamenta rekonstruo de la socio laŭ la principoj de socialismo; 3) ke Zamenhof bonege komprenis jam antaŭ 73 jaroj tion, kion eĉ nun la filozofoj kaj la politikistoj de kapitalismo ne emas kaj ne ŝatas kompreni, nome: ke la mondo ne fariĝos pli pala, pli enuiga kaj pli malriĉa, se ĉiuj homoj havos nur unu feliĉon.

Efektive la venko de la socialismaj revolucioj en la landoj de la reala socialismo konfirmas ĉiam pli kaj pli evidente tiun tendencan de la homara disvolviĝo, pri kiu Zamenhof ofte kaj libere revis, sed rare, ĉirkaŭfrazis kaj eĉ enigme parolis publike.

4. En la aŭtuno de 1910 fondiĝis la unua laborista E-gazeto, D-ro Zamenhof tralegis kun granda spiritalismo la n-ro 1 de „Laborista Esperantisto“ kaj tuj (oktobro 1910) sendis al la redaktoro de tiu gazeto entuziasmoplenan dankleteron kun bondeziro pri plej bona sukceso. Zamenhof emfazis la gravecon de tiu evento, sentis ĝin kvazaŭ revelacio kaj prognozis pri la eksterordinara rolo de la laborista klaso por la E-afero: „La kampo, kiun Vi elektis por Via laborado, estas tre grava; eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero“ (Leteroj de Zamenhof. Paris, 1948, vol. II, p. 263).

Al Zamenhof jam ŝajnis, ke li finfine trovis tiun grupon de homoj — la laboristoj, kiu savos E-on el pereoj kaj forgesoj kaj transdonos ĝin al la estonta homaro. En la fino de la letero li plue malkaŝas la dialektikon de la komenciĝinta procezo: „La laboristoj ne sole spertos la utilon de E-o, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencan kaj la ideon de la esperantismo.“ Konklude Zamenhof forte esperas, ke li ricevos de la laborista klaso ne nur subtenon por la lingvo E-o, sed ankaŭ komprenon kaj konsenton pri la pac-ideo, pri la ideo de frateco kaj justeco inter la nacioj kaj ŝtatoj. Tiu espero kaj pozitiva rilato de Zamenhof al la organizita laborista E-movado estas des pli grava por lia propra ideologia kresko, ĉar tiutempe la organizita laborista movado de ĉiuj branĉoj kaj niveloj estis neglekte traktata kaj subtakata de ĉiuj ŝtatinstancoj en la mondo.

5. Ke Zamenhof estis favore influita de la fakto pri organizita laborista E-movado kun propra presorgano atestas ankaŭ lia ekinteresiĝo pri la sorto de la laborista

klaso entute. En sia memuaro „Gentoj kaj Lingvo Internacia“, adresita al la „Kongreso de la rasoj“ en Londono (1911) li por unua fojo tute konkrete mencias la nesolvitan klas-demonon de la kapitalisma socio. En sia pripensoj li supozas, ke se la lingva (kaj religia) unueco de la homaro estos atingita, eĉ tiam la socio ne estos perfekta, ne estos ideala: „Daŭros tiam en la homaro tiuj diversaj malpacoj, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj ktp., sed la plej terura el ĉiuj, la malamo intergenta, tute malaperos“.

6. El ideologia vidpunkto en 1912 j. Zamenhof konkeris novan kulminon en sia progresema disvolviĝo. Tiujare la 15-an de februaro li skribis salutleteron al la „Bohema Laborista Esperantista en Aŭstrio“ kun sidejo en Prago. Kun plezuro kaj danko mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto „La Kulturo“. Mi deziras al Via organo plej bonan sukceson kaj mi esperas, ke ĝi certe ĝin havos. La apero de laborista gazeto en Esperanto ĉiam min tre ĝojigas, ĉar laŭ mia opinio por neniu la Lingvo Internacia kaj la esperantismo havas tiel grandan gravecon kiel por la laboristoj kaj por tiu ideo, por kiu ili batalas.“ (substreko de C. M.).

En sia dua letero al la organizitaj laboristaj e-istoj L. Zamenhof oficiale sankcias la laboradon per E-o por socialismo, eĉ utiligon de la vastigita tra la esperantistaro pacideo kaj la ideo pri frateco kaj justeco inter la popoloj, por socialismo. Tamen pro facile divenblaj kaŭzoj li ne uzas la vorton „socialismo“, sed substituas ĝin per la sinonima ĉirkaŭfrazo „tiu ideo, por kiu... batalas“ la laboristoj.

7. Sed Zamenhof ne haltas eĉ tiu kulmino. Represante la tekston de sia relaborita doktrino homaranismo en 1913 li kondamnis rekte kaj severe la subpremadon kontraŭ la laborista klaso fare de la kapitalistoj: „Ĉian ofendadon kaj premadon de homo pro tio, ke li apartenas al alia gento, al alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi mi rigardas kiel barbarecon.“

8. El propra sperto Zamenhof komprenis sufiĉe frue la esencan negativecon kaj senduban malutillecon de la ŝovinismo (1883), konsekvence kaj senkompromise li batalis kontraŭ ĝi precipe en la jaroj 1907 kaj 1914: „Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu naciismo prezentas por la homaro nur la plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. Estas vero, ke naciismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda ago — estas multe pli pardoninda ol la naciis-

mo de gentoj premantaj; sed se la naciismo de la fortuloj estas nenobla, la naciismo de la malfortuloj estas neprudenta...“

Kuraĝe kaj memfide Zamenhof kondamnas je morto ĉies naciismon — kaj la nenoblan de la fortuloj kaj premantoj, kaj la „neprudentan“ de la subpremitaj kaj ekspluatitaj. Per tiu sia koncepto li proksimiĝas konsiderinde al la marksisma-leninsma vidpunkto.

Estante elstara adepto de la ideo pri enkonduko de planlingvo en la internaciajn kaj interŝtatajn rilatojn, Zamenhof tre ofte tuŝas internaciajn problemojn. Per sia rilato al ili li konturas sian propran internaciismon. Kelkfoje Zamenhof estas nebulose ĝeneraliga, kiam li pledas por... internaciismo, ekzemple per sia aserto, „ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron“. Aliffoje por esprimi sian internaciismon li faras tion ĉirkaŭfrazite, uzante la sinonimon „granda tutmonda amo“: „Dum la pseŭdopatriotismo, t. e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas.“

Kiaspeca do estas la internaciismo de Zamenhof?

a. Zamenhof ne estas adepto de kosmopolitismo. Li skribis (24. IX. 1905) al d-ro Javal (Javal): „Ne pensu, ke hilelismo estas kosmopolito: hilelismo varmege amas sian patruon, sed li konfesas la dogmon, ke ĉiu patruo apartenas plene egalrajte al ĉiuj siaj filoj...“

b. Zamenhof ne estas adepto de sennaciismo. Li ne celas substitui la naciajn lingvojn per E-o, sed energie pledas por starigi memstarecon kaj justecon inter la nacioj kaj ŝtatoj: „... la hilelismo ne penas detrui la ekzistantajn lingvojn kaj religiojn, sed batalas nur kontraŭ la barbareco, kun kiu preskaŭ ĉiu eŭropa lando postulas, ke ĉiuj ĝiaj filoj nepre parolu tiun lingvon kaj ne alian, nepre konfesu tiun religion kaj ne alian, — alie ili estas rigardataj kiel „fremduloj“, kvankam ili en tiu ĉi lando naskiĝis kaj pasigis sian tutan vivon (1905).“

c. Zamenhof estis pacifisto, tio estas vaste konata, kvankam ankoraŭ ne studita sisteme, profunde kaj amplekse. Sed li ne restis por ĉiam klasika, pasiva, senfare babilanta adepto de pacifismo. Pri tio ekzistas pluraj argumentoj. Mi mencias nur unu. Zamenhof scipovis pli-malpli diferencigi la justan disde la maljusta milito. Rimarkinda estas la fakto, ke li ne nur ne kontraŭis, sed eĉ per vorteto ne riproĉis la unuan kontraŭimperiisman revolucion en Rusio (1905–1907). En sia kongresparolado en Genevo (1906) li

ESPERANTO — EN LA ŜTATAJN ARKIVOJN!

Laŭ edikto de la Ministra Soveto de nia lando en ĉiu distrikto estis fondita distrikta ŝtata arkivo. En ĝi oni kolektas kaj konservas dokumentojn de ekonomia, scienca, kultura, politika, religia kaj alia karaktero, posedaĵo de apartaj bulgaraj civitanoj aŭ de diversaj organizaĵoj, oficejoj kaj entreprenoj, senkonsidere de la jaro, en kiu ili estas kreitaj. Ĉiujare la dokumenta riĉaĵo, konservita en la ŝtataj arkivoj, multigas kaj ili transformiĝas en sciencajn institutojn, kie oni povas ĉerpi abundajn kaj variajn informojn pri la kompleta vivo de nia lando.

En la ŝtata arkivo de Veliko Tŕrnovo oni konservas ankaŭ valorajn dokumentojn, kiuj spegulas gravajn momentojn el la vivo de unu el la plej malnovaj nialandaj E-societoj — „Lumo“, fondita en majo 1896. Jen la pli gravaj el tiuj dokumentoj (kun fiksita jaro):

1. Fonda protokolo kaj statuto de la societo 1896
2. Diversaj fotoj 1898
3. Propagandaj materialoj — broŝuroj, afiŝoj k. a. 1903
4. Korespondadoj kun e-istoj kaj societoj 1906
5. Materialoj de distrikta E-konferenco 1924
6. Materialoj de la unua nacia E-kongreso 1907
7. Materialoj ligitaj kun la okazintaj en V. Tŕrnovo naciaj E-kongresoj 1936
8. Diversaj protokoloj pri estrarkunsidoj de la societo.

En la arkivo de V. Tŕrnovo troviĝas ankaŭ materialoj el la persona fonduso de Hristo Kamburov — eksapartizano, kiu tuj post la 9-a de septembro 1944 estis dum nelonga tempo prezidanto de societo „Lumo“. Inter ili oni vidas parton de lia korespondado

kun progresemaj e-istoj el diversaj landoj. Personan fonduson el la Ŝtata Arkivo havas ankaŭ la skribanto de ĉi tiuj linioj. Ĝi entenas materialojn pri la historio de la E-movado en V. Tŕrnovo kaj ĝia distrikto kaj diversajn leterojn el korespondadoj kun eksterlandaj e-istoj.

En majo 1976 en V. Tŕrnovo okazis solena jubilea celebrego de 80 jaroj ekde la fondo de E-societo „Lumo“. Ĉiuj dokumentoj, korespondadoj, fotoj, planoj ktp., ligitaj kun tiu evento, kolektitaj kaj aranĝitaj, estis deponitaj en la Ŝtata Arkivo. Depositaj estas ankaŭ diversaj materialoj ligitaj kun la 34a TEJO-kongreso en V. Tŕrnovo en 1978.

Bedaŭrinde, multaj valoraj dokumentoj de E-societo „Lumo“ kaj de apartaj elstaraj e-istoj el nia distrikto ne estas en la arkivo — ili estis neniigitaj de la germanaj hitleranoj en 1941.

Tre granda perdo estas tio, ke ankaŭ multajn jarojn al neniŭ venis la ideo interesiĝi pri personaj arkivoj de la veteranoj de nia E-movado Hristo Popov kaj Haralampi Baĉvarov. Certe multaj valoraj dokumentoj estas jam neniigitaj.

Se materialoj pri ĉiuj E-aranĝoj, okazintaj en nia lando — kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj, festivaloj, jubileaj celebrego, E-kursoj k. a., raportoj, artikoloj en gazetaro, materialoj el E-korespondadoj ktp. trovus lokon en la Ŝtataj arkivoj, estonte ili prezentos riĉan kaj valoran dokumentaron, kiun oni povas profiti por kompilo de detala historio de la E-movado — en la koncerna distrikto kaj en la tuta lando.

Laŭ mi la distrikta estraro de BEA devas urĝe prizorgi tiun gravan por nia movado taskon.

Hristo DOLĈINKOV

raportis pri ĝi kun certa simpatio: „Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajto de homo.“ Ĉio ĉi montras, ke Zamenhof rompis la ŝelon de la klasika pacifismo, eliris el ĝi kaj faris gigantan paŝon antaŭen al la estonteco. Jen estas la sekreto, kiu malŝlosas al ni la respondo al la demando, kial la nuntempaj e-istoj pacdefendantoj sentas proksime al si la pactestamenton de Zamenhof.

Ĉ. Zamenhof pledis por egalrajteco por la minoritatoj. Esplorante la kaŭzojn pri la pogromoj en Rusio (1906) li venis al difinitiva konkludo, ke kulpaj estas ne la popoloj, sed la regantaj carismaj kamariloj: „Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpaj pri la besta buĉado en Bjalistok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la tataroj kaj armenoj estas kulpaj pri la konstanta buĉado en Kaŭkazo, ĉar ambaŭ gentoj estas trankvilaj, ne deziras altrudi al iu alian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi.“

Oni scias nun tre klare, ke kulpaj estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj ruzoj kaj malnoblaj rimedoj, per amase disemataj mensogoj kaj kalumnioj arde kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj.“

d. Sub la influo de Marks — Engels-verkaro L. Zamenhof pledis por sociala justeco, efektiviĝo per nenigo de kapitalismo kaj starigo de socialismo. Ni jam parolis pri tio. Nun ni deziras prezenti novajn argumentojn, ke Zamenhof pledis por fundamenta rekonstruo interne de ĉiu nacio, inkluzive en la sfero de la socialaj rilatoj inter la apartaj individuoj (1913): „... ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj siaj loĝantoj, kiam ajn supozatan devenon, lingvon, religion aŭ socian rolon ili havas.“ Al tiu direkto kontribuas ankaŭ la fakto, ke Zamenhof tre ofte uzas la esprimon „justeco inter la nacioj“, sed iufoje li substituas ĝin per

la pli larĝsenca „interhoma justeco absoluta“, kiu komprenigas ne nur starigi justecon inter la nacioj, sed ankaŭ justecon inter la individuoj de ĉiu aparta nacio, t. e. socialan justecon.

Tiaj pozitivaj ŝanĝoj en la ideologia sfero aperis pli-malpli ankaŭ ĉe multaj aliaj e-istoj en la mondo. Kaj Zamenhof ne estis surprizita, kiam okaze de la Nova 1914 Jaro li ricevis informon de generalo Zeber (Seber), gvidanto de la Centra E-Oficejo en Parizo, ke en Japanio estas arestitaj 24 e-istoj kaj 17 el ili estas pendumitaj pro ribelo.

La izoligo disde la internacia E-movado pro eksplodo de la Unua Mondmilito, la malsanigo kaj fine la morto en aprilo 1917 ĉesigis tiun pozitivan proceson de ideologia transformiĝo ĉe Zamenhof. Post la milito tiun tendencan reprenis kaj daŭrigis la proleta E-movado kaj en nia epoko — la Mondpaca Esperantista Movado.

NOTO DE LA REDAKCIO. Ni aperigos ankaŭ materialojn de aliaj samideanoj, kiuj tuŝos la temon kaj ĝenerale la ideologion de Zamenhof. Bonvolu sendi al ni tiajn materialojn!

LA INSTRUANTO

Al malgrasa knabineto, kiu sidis sur la bordo de Volga kaj fervore formis ion el argilo, venis knabo kaj demandis partoprenplene:

— Kion vi faras?
— Mi bakas pirogon.¹
— Per kio ĝi estas plenigita?
— Per fungoj. Foje vi donis similan al mia avo kaj al mi. Ĉu vi ankoraŭ memoras tion?

— Jes, mi memoras. Kaj kie estas via avo?
— Li iris almozpeti. Sed hodiaŭ li ne kunprenis min.

— Ĉu vi havas gepatrojn?
— Ne. Paĉjon oni forprenis kaj veturigis al Siberio. Kaj panjo mortis pasintjare.

Pecigoj

SUDAFRIKA VARIANTO DE „OTELO“

Policejo en iu urbo de Sudafrika Respubliko. Ĉe tablo sidas la Unua Polico (U. P.), apude en fotelo sidas la Dua Polico (D. P.) kaj fumas. Antaŭ ili staras teatra reĝisoro (R.).

R.: Nu, kial oni ne permesis la teatraĵon, sinjoro prefekto?

U. P.: Ne rajtas negro antaŭ la okuloj de respektinda publiko strangoli blankulinon. Ĉi tio estas tro, tro, sinjoro reĝisoro! Oni bezonas ion alian.

D. P.: La polico estas Dio super la aferoj de la arto. Bonvolu trovi ion alian.

R.: Kaj kion alian, sinjoroj? Do, estas la fama Sekspiro, sinjoroj, kion alian?

D. P.: Kion alian? Ne Otelon mortigu Dezdemonon, sed ŝi prefere... lin! Mi diru do: Jago teksas siajn intrigojn, Otelon ekscias pri la malfideleco de sia edzino Dezdemono, kaj ŝi... ŝi mortigas lin pro tio. Nu kiel?

U. P. (ridegas): Pompe, sinjoro prefekto, pompegel!
R.: Laŭ vidpunkto de la polico tia intrigevoluo taŭgas sendube. Sed, sinjoroj, oni nenion povus kompreni!

D. P.: Nu, se ni faros aliel: Dezdemono amas Jagon, simpatia fraŭlo, kiu servas, hm, nu, en la sekreta polico. Sed sur la lazuran firmamenton de ilia ĉasta amo surgrimpas nigra ombro — la intrigema Otelon. Tamen feliĉe Jago kaj Dezdemono senvaligas lin ĝustatempe kaj linĉas la aĉulon!

U. P.: Skue genie, sinjoro prefekto! Kaj antaŭ la scenkurteno estus tre bone inkludi veran „Happy end“ (hepi-end) — feliĉan finon: ili ambaŭ fornavigas al Honolulu per la privata jaĥto de Jago por agrable pasigi la mian monatan tie.

D. P.: Nu, la ideo estas bonega!

R.: Sinjoroj, sed tio ne taŭgas. Oni devas reverki la teatraĵon.

D. P.: Pro kio?

R.: Do, pro tio, ke ĉiuj situacioj ŝanĝigos.

D. P. Nenion oni devas reverki, nenion. (Kontenta, li ekstaras kaj komencas paŝi). Endas nur ŝanĝi iun el la personoj. Jago kaj Dezdemono estu ne tuŝendaj, sed Otelon ne rajtas esti!

— Kiel vi nomigas?
— Nataŝa, Negramotkina.²
— Kaj mi estas Volodja Uljanov.
— Ni ludu kune, — proponis la knabineto. — Tamen vi ne moku min „Negramotkina“, kiel faras la aliaj.
— Certe mi ne faros tion. Ĉu vi volas, ke mi instru al vi legi?

— Jes.
— Tiam faru el argilo longajn bastonetojn, kaj mi faros el ili literojn, ĉu?

Baldaŭ la suno sekigis ĉiujn literojn de la rusa alfabeto kaj Nataŝa ekparolis laŭte post Volodja: A, B, V, G, D.

Volodja diris:
— Vi havas bonan memoron kaj baldaŭ scipovos legi.

Nataŝa legis denove la sekiĝintajn literojn kaj estis feliĉa, ke ŝi havas nun instruanton.

¹ Pirog — speco de rusa kuko.
² „Negramotkina“ — el la rusa vorto „negramotnaja“ t. e. analfabetino.

El la germana: M. Băce

U. P.: Vi certe pravas, sinjoro prefekto. Otelon ne rajtas esti!

D. P.: Otelon oni devas forĵeti kiel maltaŭgan personon. Neniam negrojn!

R.: Sed ne ekzistas teatraĵo sen Otelon!

D. P.: Lian lokon okupos blanka Otelon. Blonda, kiel Hamleto.

R. (ĝoje): Nu jes! Hamleto, kiu ekamis Dezdemonon, kaj ŝi, memkompreneble, lin.

D. P.: Kaj ĉio restas kiel estas!

R.: Kaj oni ne bezonas reverki la tekston!

U. P.: Kaj rigardu: Villamo Sekspiro! Kiel vi diris: oni devas estimi la aŭtoron, ĉu ne?

D. P.: Nu, do, la polico ne havas objetojn. La registaro benos la afiŝon de la „Nova Otelon“.

D. P.: En ĉi teatraĵo kriminalo mankas.

R. P. (ridas): Per la nova varianto de la teatraĵo vi povas regali la spektantojn preskaŭ ĉiutage.

R.: Kaj ĉiuvespere oni nutros la publikon per tiu manĝaĵo...

El la rumana: Osipov

FESTO DE LA PUPO — FESTO DE LA KNABINO

En Japanio la 3a de marto estas Festo de la Knabino. Oni ornamas pupojn en la ĉambro kaj ankaŭ ili arangas persikflorojn, laŭ kiuj oni nomas ĉi tiun feston „Festo de persikfloroj“. Kiam ina bebo renkontas por la unua fojo la 3an de marto, oni nomas la tagon „Hacu zekku“ (la unua festotago de la pupo). Tiam la patrinaj geavoj donacas al la nova bebo kompletan de pupoj. Ĝi konsistas el geprincoj, 3 servistinoj, 5 muzikistoj, 3 servistoj kaj diversaj posedaĵoj aŭ iloj por vivado, miniaturaj. Oni ornamas ilin la 3an de marto ĉiutage. La ino portas ilin al la hejmo de sia edzo, kiam ŝi edziniĝos.

Oni kuiras specialan manĝaĵon inkluzive amazake (rizvino dolĉa), hiŝimoĉi (lozangaj rizkukoj) kaj hinaare (pufigitaj rizgrajnoj dolĉaj). La familianoj gaje manĝas kaj trinkas ilin antaŭ la pupoj.

Krom la Festo de la Knabino estas ankaŭ Festo de la Knabo (la 5an de majo). Poste ni skribos al vi pri la festo.

FORLASIS NIN

„Ekde nun mi havas novan pantalonon!“. Tiun versajon de Vesa Paspaleeva laŭ simpla, sed tre konvena melodio ekkantis la infanoj antaŭ pli ol ducentoj. Delonge tiuj infanoj estas maljunuloj kaj nun kune kun siaj nepoj kaj genepoj kantas ĝin ame kaj estime al la konata infanverkistino. Pli ol 80-jara ŝi forpasis en marto, sed ŝiaj kantoj restos kiel ĉiam valoraj perloj en la trezorejo de la bulgara infanliteraturo. La infanoj legos kaj relegos, recitos kaj kantos ilin.

Kiam Paspaleeva estis en la unua klaso en sia naskiĝurbo Kjustendil, la estara poeto Penčo Slavejkov dediĉis al ŝi la libron „La ora fiŝeto“ de A. S. Puŝkin. Ĉi donaco ĉarmis ŝian animon kaj ŝi por la tuta vivo ekŝatis la realismon de la granda rusa poeto. Tiutempe la malgranda Veska ofte aŭskultis la popolkantojn de sia avino kaj la fabelojn de sia najbaro avo Andon. Poste ŝi multe lernis de verkistoj kiel Iv.

Vazov, P. K. Javorov, Elin Pelin, Hristo Smirnovski, S. Marŝak, K. Cukovskij. Sed kun plej granda danko mia patrino rememoris la verkiston Anton Straŝimirov, kiu ofte vizitis nian domon. Jam en 1922 j. li diris al ŝi: „Vesa, ne okupu vian tempon per alio. Via vojo estas en la infana literaturo.“

Kvindek ok jarojn ŝi marŝis laŭ tiu ĉi vojo. Pli ol 30 libroj apartenas al ŝia plurno: „La gaja erinaco“, „En la arbara urbo“, „La kompatema sciureto“, „Hirundeto, de kie vi venas?“, „La papageto Maks“, „Bildetoj transmaraj“, „Printempo en la patrujo“ k. a.

La malgrandaj legantoj ŝatas la verkojn de V. Paspaleeva. Si amuzas ilin kaj samtempe edukas ĉe ili la plej bonajn kvalitojn de la bulgara popolo: laboremo, honesteco, kredo je la bono kaj la belo en la vivo, amo al la patrujo, estimo al ĉiuj popoloj, amo al la paco kaj la internacia amikeco.

PATRINA AMO

Dum vi per viaj okuletoj, infano, min rigardas, forgesa: mi malĝojas ĉian kaj forlasas mi kaj ardas!

Dum mi brakumas vin tenere kaj kisa, kaj karesas, la neĝblov do eksilentas kaj la tempesto ĉesas!

Mi pretas pasi tra ventegoj, tra fajro, ŝtormo mara, vin gardi kontraŭ malbonaĵoj, infano mia kara!

El la bulgara: Asen Grigorov

FESTO TUTPOPOLA

Festo estas nun popola — de l'infanoj ĉiuj tag'. Flirtu, flirtu libervole, flirtu de l'milionoj flag'!

„Pacot!“ sur la flag' ni skribas, pacot por la tuta ter'! ke vi lernu, ke vi spiru, ke vi kresku en liber'!

Lenin-vero kaj saĝeo ŝirmas la infanojn nun. Flirtu, flirtu, flag-fo-teco, flirtu, gvidu nin al sun'!

El bulgara: Ljudmila Paspaleeva

Vortenigmo

Skribu horizontale la nomojn de la ĉefurboj de respublikoj de USSR kaj la nomon de la ŝtato mem. Post bona solvo en la cirkloj de maldekstre dekstren vi legos la nomon de mondfama ideologo, revoluciulo kaj ŝtatestro.

En linio I enskribu la literojn de la adekvataj ciferoj kaj vi legos la nomon de la naskiĝurbo de tiu homo.

En linio II skribu la tagon, en kiu li naskiĝis.

En linio III skribu lian naskiĝjaron.

En Sofio forpasis en sia 76-jara aĝo

Srebro Petrov

Gis la 9. 9. 1944 li laboris en Plovdiv kiel bankoficisto, post tiu dato — en la Komitato de Ŝtata Kontrolo en Sofio.

E-on Srebro Petrov lernis en 1925 j. En 1929 oni elektis lin prezidanto de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv. Petrov multe laboris por Esperanto, gvidis E-kursojn. En Sofio li multjare estis membro de la Centra Revizia komisiono de BEA.

